

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

10


1980





Chang-e kaj Houyi amas unu la alian.

La baleto "Al la Luno" estas adaptajo de la rakonto pri paffaligo de naŭ sunoj fare de Houyi kaj flugo de Chang-e al la luno. Tiu bela legendo vaste cirkulas inter niaj popolanoj. Legu la samtitolan artikolon en tiu ĉi numero.



Demono Pangmeng


La baleto

“Al la Luno”

Fotoj de WU FUQIANG



La juna paro en gracia danco



En la geedziĝa ceremonio de Houyi kaj Chang-e
Bedaŭro ĉe la disiĝo



La Ĉina Orienta Ensemblo

La Orienta Ensemblo estis fondita en 1962. En lernado kaj prezentado de popolaj dancoj de aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj, ĝi multe kontribuis al la kultura interŝanĝo inter la popoloj de tiuj landoj. Ĝi iam faris turneon al Egiptio, Alĝerio, Maroko, Tunizio, Sirio, Italio, Francio, Singaporo k.a. landoj kaj regionoj kaj estis varme bonvenigata de tieaj spektantoj.

Fotoj de QU WEIBO



Meksikia danco

Japana danco



Ĉina kore-nacieca danco



Pakistana danco



Tajlanda danco



EL POPOLA ĈINIO

1980
N-ro 10
(265)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Ĉina filmaktoro Chen Chong, kiu ricevis la premion de la plej bona aktorino de Ĉinio en 1980 kaj la premion de la plej bona aktorino en la Festivalo "Batalo por Libero" de Jugoslavio.

SUR LA DORSKOVRILO:

Speco de orkideo

KOLORA SERIO:

Baledo "Al la Luno"

La Ĉina Orienta Ensemblo

Pejzaĝoj de Beijing

Fotoj pri naturaj belaj faritaj de E-istoj

Qufu — Naskoloko de Konfuceo

NIGRA-BLANKA SERIO:

Lerta bredistino de silkraŭpo — Pan Shuifeng

Junulinoj de la metiejo de Sichuan-brodaĵo

Blanknaĝila delfeno

Geknaboj en la Somera Kampado

Enhavo

Por havigi laboron al gejunuloj	2
Ili ricevis laboron	4
Pri la spezo de iu laborista familio	8
ĈEL fariĝis aliĝinta landa asocio de UEA	10
KURANTAJ AFEROJ	11
NIA KULTIVEJO: Mi kaj Esperanto	12
Rememoro pri Verda Majo, kunbatalantino de la ĉina popolo	14
INTER NI	16
Kiel mi vidis antikvan kaj novan Ĉinion	18
Albert Einstein — ŝerce kaj serioze	20
VIDINDAJ LOKOJ: Ok vidindejoj de Beijing	22
KORESPONDI DEZIRAS	24
ESP-NOVAĴOJ	25
Reformado de sal-alkala tero	27
TRA ĈINIO: Nanjing — antikva kaj juna urbo	30
Tombo-ŝtonoj de tri misiistoj en Beijing restarigitaj	33
Kvar tajloroj (Humorajo)	33
Mao Dun kaj lia "Meznokto"	34
Meznokto (Fragmento)	37
La baletto "Al la Luno"	40
AMIKECO: Majstroj de la Pariza Opera Teatro en Beijing	42
KULTURAJ NOTOJ	44
KALEJDOSKOPO	45
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Qufu — Naskoloko de Konfuceo	46
KARIKATURO	46

Generala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOZI SHUDIAN
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Por havigi laboron al gejunuloj

Iuj el niaj legantoj skribis al ni: Havigi laboron al gejunuloj preskaŭ fariĝis malfacile solvebla socia problemo en multaj lokoj de la mondo. Ĉu ankaŭ ĉinaj gejunuloj ĉagreniĝas pro senlaboreco? Ĉu iliaj gepatroj zorgas ankaŭ pri tio? Kiajn rimedojn la ĉina registaro aplikas por solvi tiun problemon?

Kun tiuj demandoj nia raportisto intervjuis respondeculon de labora fako, kaj la lasta donis la jenajn respondojn. Krome, ni aperigas en tiu ĉi numero la artikolon "Ili ricevis laboron", kiu traktas problemon similan al tiu en aliaj urboj de nia lando.

La Red.

Demando: La raporto pri la registara laboro farita en la Dua Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio en junio de 1979 diras: "Ĉijare la registaro laŭplane havigos laboron al pli ol 7,000,000 personoj en unuoj de tutpopola posed-sistemo kaj unuoj de kolektiva posed-sistemo." Kiom da gejunuloj estis inter ili? Kiel aperis tiel granda nombro?

Respondo: El la 7,000,000 personoj plejparto estis gejunuloj. Inter ili troviĝis diplomitoj

de superaj lernejoj, mezgradaj fakaj lernejoj kaj teknikaj kolegioj, urbaj abiturientoj pretaj iri al laborposteno, parto de la urbaj malmobilizitoj kaj intelektaj gejunuloj revenintaj de kamparo. La diplomitoj de la superaj lernejoj, mezgradaj fakaj lernejoj kaj teknikaj kolegioj laŭplane kulturitaj de la ŝtato ricevis laboron donitan de la ŝtato post ilia diplomitiĝo.

El nia loĝantaro la gejunuloj estas multaj. La kaŭzo kuŝas en

tio, ke en la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj la nasko-procento estis tre alta en Ĉinio. Oni taksis, ke ĉiujare antaŭ 1990 pli ol 20,000,000 personoj atingos la adoleskantecon. Dum en 1979 ĉ. 27,000,000 personoj atingis la adoleskantecon. Tiom multaj gejunuloj, ekskluzive de tiuj en la kamparo, lernejoj kaj armeoj, plejparte devas ricevi laboron. La dekjara ĥaoso komencita en la meza periodo de la sesdekaj jaroj serioze damaĝis la nacian ekonomion kaj iuj politikoj estis



Legombazaro de Shanghai servas tage kaj nokte.



malkonvene aplikataj, kio prokrastis la ĝustatempan solvon de la problemo de laboro de multaj gejunuloj. Tio kaŭzis pliiĝon de senokupaj gejunuloj.

Demando: Kiel la ŝtato donis laboron al tiom multaj personoj?

Respondo: Kvankam la nacia ekonomio de nia lando estas en reordiga periodo kaj la ŝtato ankoraŭ havas malfacilojn, tamen la lokaj registaroj de diversaj niveloj kaj koncernaj fakoj ĉiamaniere donis laboron al gejunuloj. Ili aktive disvolvis komercon, servon, riparojn kaj metiojn de tutpopola posedsistemo kaj kolektiva posedsistemo por ebligi al senokupaj gejunuloj ricevi laboron. En la lastaj jaroj en iuj ĉirkaŭurboj estis fonditaj farmejoj, forstokulturejoj kaj brutobredejoj, plejparto el kies laborantoj estas intelektaj gejunuloj. Tiurilate oni atingis bonajn sukcesojn. Por altigi la kvaliton de la rezervaj laborfortoj, en aliaj urboj oni starigis diversajn profesiajn lernejojn, konsiderante ke la diplomitoj de ordinara mezlernejoj ne posedas fakan teknikon.

Demando: Ĉu oni aplikis varbadon en tio?

Respondo: Oni aplikis rimedon varban kaj ankaŭ distribuon. Tamen plejofte oni aplikis varbadon: fari ekzamenon kaj elekti la elstarajn. Estis malsamaj postuloj de la ekzamenoj al la kandidatoj por malsamaj laboroj. Ekzemple, por varbi metilernantojn, oni faras ekzamenon ne nur pri ilia klereco sed ankaŭ pri ilia faka scio.

Demando: Kiel oni kreis favorajn kondiĉojn por doni laboron al gejunuloj?

Respondo: Tion oni faras laŭ la bezono de la produkta disvolviĝo kaj la socia servo. Enketo montris, ke en nia lando ankoraŭ multaj rimedoj por laboro ne estis uzitaj, tial ĉiujare troviĝis multaj personoj kiuj ne ricevis laboron. La nombro de laboristoj de niaj industriaj branĉoj estas tro granda kaj la diversaj urbaj servoj ne povas kontentigi la bezonon de la disvolviĝo de la konstruaj aferoj kaj tiun de la popola vivo, tial de nun ni devas kontentigi unue la bezonon de komerco, riparoj, turismaj servoj, publikaj servoj, ĝardenaj laboroj kaj aliaj.

Demando: Kial aperis tia kontraŭdira fenomeno?

Respondo: Estas multaj kaŭzoj. Ekzemple, en la pasinteco oni ne donis sufiĉan atenton al la turisma afero, tial ĝi ne disvolviĝis. Nur nun tiu nova afero povas akcepti pli multajn laborantojn. En la pasinteco la ŝtato emfazis la transiron de la kolektiva ekonomio al la tutpopola ekonomio kaj limigis kaj eĉ nuligis la individuajn ekonomiojn. Tiu malkonvena politiko bridis la disvolviĝon de la kolektiva ekonomio, dume la tutpopola ekonomio disvolviĝis ne en alta rapideco nek en ĉiuj fakoj kaj servoj, kio kaŭzis la kontraŭdiran fenomenon, ke multaj gejunuloj restis senokupaj dum multaj aferoj ne faritaj.

Nun, tiu nenormala fenomeno estas iom post iom konata kaj forigata. La kolektiva ekonomio en multaj urboj estas disvolviĝanta kaj ekzistos longtempe kun la tutpopola ekonomio. Laŭ la difino de nia konstitucio, la individuaj laboruloj povas okupiĝi pri komerco, riparoj kaj servoj permesitaj de la ŝtata leĝo, sen ekspluatado de aliaj.

Ili ricevis laboron

de QINGZHEN



EN la pasinta unu jaro aperis en Beijing (Pekino) multaj vendejoj, manĝejoj, gastejoj, fabrikoj kaj metiejoj administrataj de gejunuloj. Iuj el tiuj fabrikoj kaj vendejoj produktas

aŭ vendas ĉiutagajn necesajojn kaj diversspecajn metiartaĵojn kaj ornamajojn. La butikoj estas ĉiam plenaj de klientoj pro la malmultekosteco kaj bona kvalito de komercaĵoj kaj la

afabla servado. La metiejoj kaj vendejoj fonditaj de ili estas plejparte entreprenoj de kolektiva posedanteco, kiuj respondacas pri siaj propraj profitoj kaj perdoj kaj praktikas la principon “pli da pago por pli da laboro”. La gejunuloj akiris laboran kapablon, elvolvis sian talenton kaj ekhavis regulan enspezon.

En Chongwen-distrikto de Beijing estis 19,600 senlaboraj gejunuloj. Poste oni fondis 256 tiajn entreprenojn kaj per tio havigis laboron al 15,500 el ili. Antaŭ nelonge mi vizitis iujn el iliaj laborejoj kaj servopunktoj en tiu distrikto. Kaj tio multe larĝigis mian vidkampon.

Demando: Ĉu la ŝtato konsideras la individuan intereson de gejunuloj dum dono de laboro al ili? Ĉu ili estas kontentaj pri sia okupo?

Respondo: Oni laŭeble kontentigas la bezonon de la ŝtato kaj la deziron kaj intereson de la individuoj.

Ekzemple, antaŭ ekzameno por eniri en superan lernejon kaj antaŭ ricevo de laboro post diplomitiĝo, niaj gejunuloj mem enskribas sian deziron en formularon. Nun kiam entreprenoj ĉu ŝtataj aŭ kolektivaj varbas laboristojn, la gejunuloj povas enskribi sian nomon por ekzameno laŭ sia talento kaj intereso.

La gejunuloj havas diversajn dezirojn kaj interesojn, el kiuj iuj estas identaj kun la bezonoj de la ŝtato kaj aliaj ne tute. Kiel supre dirite, por forigi la malproportcion de la socia ekonomia strukturo de urboj, oni devas laborigi pli multajn gejunulojn en urbaj komerco kaj servoj. Se

tiel, plejparto de la gejunuloj povas esti ĝojaj, sed troviĝas iuj gejunuloj, eĉ ties gepatroj, kiuj ne ŝatas tiajn laborojn, precipe servojn en la kolektivaj entreprenoj. Ili deziras laboron en la granda entrepreno de tutpopola posedsistemo. Tiu fenomeno estas kaŭzita de tio, ke en la pasintaj jaroj la politiko pri la kolektivaj entreprenoj estis ne sufiĉe stabila kaj ne tute racia, kaj kompreneble ankaŭ de tio, ke iuj malestimis servajn laborojn. Por disvolvi tiujn servojn, oni devas revizii iujn ekonomiajn politikojn pri diversaj servoj kaj la politikon pri kolektiva ekonomio por elvolvi ĝiajn avantaĝojn — mem respondeci pri la profito kaj perdo, pli multe labori kaj pli multe ricevi. Se la kolektivaj entreprenoj estas bone funkciigitaj, la salajro kaj bonstato de iliaj laboristoj povas esti pli altaj ol tiuj de entreprenoj de tutpopola posedsistemo por eksciti ilian aktivecon. Samtempe oni

devas eduki la gejunulojn, ke ili konsideru la interesojn de la ŝtato kaj la popolo, ĝuste traktu la rilatojn inter la intereso de la individuo kaj la bezono de la popolo kaj ĝoje akceptu la laboron.

Demando: Kian efikon tiuj rimedoj havas?

Respondo: La praktiko en la lastaj du jaroj montris, ke la rimedoj ricevis certan sukceson en dono de laboro al senokupaj gejunuloj. En la lasta jaro 9,000,000 personoj en la tuta lando ricevis laboron. Iuj urboj kia Changzhou donis laboron al ĉiuj senokupaj gejunuloj. Dum laboraranĝo por senokupaj gejunuloj multaj urboj pliampleksigis servojn kaj produktadon, kio donis oportunon al la popolo, prosperigis la merkaton, ricevis aprobon de la publiko kaj kontentigis la gejunulojn kaj iliajn gepatrojn. En la estonteco ni daŭre aplikos tiujn efikajn rimedojn por solvi la problemon de laboro de gejunuloj.

PROSPERA VENDEJO DE KALIGRAFAĴOJ KAJ PENTRAĴOJ

La okulfrapa elpendaĵo “Yanjing-vendejo de Kaligrafiaĵoj kaj Pentraĵoj” estas sur ruĝa kolono en la postkorto de la Preĝejo de Riĉa Rikolto en la parko la Ĉiela Altaro. Sekvante homamason, mi eniris en la halon kaj vidis, ke sur ĉiuj muroj pendas pentraĵoj de la famaj pentristoj Li Kuchan, Dong Shouping, Huang Zhou k.a., ĉe la piedoj de la muroj metiĝas multegaj kaligrafiaĵoj en vitrokadro kaj en la mezo de la halo lokiĝas vitrita ortangula vendotablo plena de lerte faritaj ludiloj, delikataj juveloj kaj malgrandaj metiartaĵoj, kiuj altiris al si multajn fremdlandajn gastojn. Kiam ili aĉetis plaĉajn kaligrafiaĵojn kaj metiartaĵojn, ili ĝoje diris, ke en Ĉinio ili ne nur vizitis vidindajn lokojn sed ankaŭ aĉetis memorajojn. Ili fojerefoje dankis la junajn vendistojn.

La 40-jara vicedirektoro Zhao Zunri rakontis al mi la histo-

rion de la vendejo. Li diris, ke inter la senlaboraj gejunuloj en Chongwen-distrikto iuj tre ŝatas pentri, tamen ne estis speciale trejnitaj. Informiĝinte pri tio, la distrikta labora fako organizis ilin kaj invitis veteranajn pentristojn kaj profesiajn belartistojn por direkti ilin, tiel ke gejunuloj rapide progresis en sia pentrarto. Komence ili vendis siajn pentraĵojn en malnova budo de la parko. Poste ili luis du halojn malantaŭ la Preĝejo de Riĉa Rikolto multe frekventata de vizitantoj kaj starigis tie Yanjing-vendejon de Kaligrafiaĵoj kaj Pentraĵoj. En la unua monato ili vendis 62 pentraĵojn, el kiuj 57 estis faritaj de ili mem. Intelekta junulino Wu Fengyu, kiu revenis el farmejo de nordorienta Ĉinio, estas lerta en pentrado de antikvaj belulinoj. Antaŭe mankis al ŝi ŝanco disvolvi sian talenton. Nun ŝi multe progresis kaj 3 el ŝiaj pentraĵoj, kun valoro de 180 juanoj, estis aĉetitaj de fremdlandaj gastoj. La vendejo ankaŭ peris por vendi malgrandajn metiartaĵojn faritajn de loĝkvartalaj gejunuloj, kiel dra-

ko, leono, orfiŝo, floro kaj modelo de la Preĝejo de Riĉa Rikolto el jadaj pecoj restigitaj post faro de grandaj metiartaĵoj.

La vendejo estas subtenata de diversrondaj personoj. La ĉefo de la Centra Instituto de Artoj kaj Metioj faris surskribon por la elpendaĵo de la vendejo. Iuj malnovaj pentristoj venis por doni lekciojn kaj fari pentraĵojn. Iu kanada gasto neprevolis pentraĵon de Dong Shouping pri pino. La lasta jam delonge ne faris komercajn pentraĵojn pro sia grandaĝo kaj malsano. Tamen informiĝinte ke oni fondis la vendejon por havigi laboron al gejunuloj, li tre ĝojis kaj tuj faris pentraĵon por ĝi, kiun oni poste vendis al la gastoj. Cao Yue, filino de la kreinto de la fama metiartaĵo “homfiguroj en aĵura juglanda ŝelo”, ne nur liveris tiajn metiartaĵojn al la vendejo, sed ankaŭ helpis ĝin instrui metilernantojn. Nun la vendejo nombros 107 homojn kaj ĝiaj komercaĵoj havas 200 kategoriojn kaj pli ol 5,000 specojn. Ĉiumonate la vendejo enspezas 130,000



Junulo de la fotostudio de la Orienta Huashi-strato de Beijing servas al klientoj.



Fremdlandaj gastoj aĉetas metiartaĵojn en Yanjing-vendejo de Kaligrafaĵoj kaj Pentraĵoj.

juanojn. Ĉiu el la 77 junaj vendistoj enspezas meznombre pli ol 60 juanojn ĉiumonate. Nun ili diligente lernas fakajn sciojn kaj fremdajn lingvojn por fari la vendejon pli prospera.

La fondo de Yanjing-vendejo de Kaligrafaĵoj kaj Pentraĵoj komprenigis la distriktan laboran fakon, ke fondo de entreprenoj de kolektiva posedanteco, kiuj vendas siajn produktaĵojn kaj respondecas pri la propraj profitoj kaj perdoj, estas bona rimedo por havigi laboron al urbaj gejunuloj. La aŭtoritatoj de la loĝkvartalo "Sporta Halo" en tiu distrikto movis tieajn maljunajn laboristojn, senokupajn gejunulojn kaj ties gepatrojn al prezento de proponoj, kaj kontaktiĝas kun proksimaj produktaj organizoj. En la daŭro de nur kelkaj semajnoj ili jam trovis dekelkajn kanalojn por akiri laboron. Interalie, iuj laboroj, kiel fari malgrandajn metiartaĵojn kaj brodi teatrajn kostumojn, povas okupi pli ol 1,000 gejunulojn.

NOVAJ SERVOJ

Antaŭe en la loko norde de la movoplena Qianmen-strato kaj sudoriente de la Sago-pordego troviĝis nur kelkaj butikoj, sed nun aldoniĝis al ili vico da novaj butikoj kaj budoj. Mi haltis antaŭ iu budo kaj vidis, ke tri junulinoj estas vendantaj broditajn antaŭtukojn. Por altiri klientojn ili portis freŝkolorajn antaŭtukojn sur si kaj varme rekomendis siajn varojn. Tiamaniere baldaŭ elĉerpiĝis la tuko.

Tiu servobudaro estis fondita de gejunuloj de Qianmen-loĝkvartalo, Chongwen-distrikto. Ĝia juna estro rakontis al mi, ke komence ili vendis nur teon. Por kontentigi bezonojn de la popolo, ili plimultigis la specojn de siaj varoj kiel ekzemple plastaj manĝaj-saketoj, ŝuoj, ĉapejoj, vestoj k.a. En varmaj tagoj ili vendas glaciaĵojn, oranĝan sukron, kratag-fruktan tranĉaĵon kaj diversajn medikamentojn

kontraŭ sunfrapo. Nun ili starigis ankaŭ etan drinkejon.

Kiel aliaj entreprenoj de kolektiva posedanteco, ili praktikas la principon "pli da pago por pli da laboro" kaj "memrespondi pri la propraj profitoj kaj perdoj". Premioj el la profito estas donitaj al ili laŭ iliaj diligenteco, disciplinemo, aktiveco kaj lerteco. Tio multe altigis la laboraktivecon de la gejunuloj.

Antaŭ unu jaro, oni ofte vidis longajn vicojn de atendantoj por sin fotografi sur Tian'anmen-placo, ĉar tie servis ne sufiĉe da fotistoj el ŝtataj fotostudioj. Sed nun tiuj longaj vicoj malaperis pro tio, ke fotostudioj fonditaj de iuj gejunuloj sendis tien siajn fotistojn kaj la lastaj akceptis plejparton de la klientoj. Interalie, dek junuloj de Qianmen-loĝkvartalo fondis fotoservon. Li Chuanyou, estro de la propaganda grupo de la loĝkvartala partia komitato, tre subtenis ilin. Li memvole laboris kiel ilia teknika direktanto kaj nun fariĝis ilia gvidanto. Ili laboras de frua mateno ĝis malfrua vespero, dum la fotistoj de la ŝtataj fotostudioj plenumas sian oficon en relative mallonga tempo. La antaŭaj altiras tre multajn klientojn per sia bona servado kaj ĉiam pli perfektiganta tekniko, kvankam ilia fotografa prezo estas iom pli alta ol la ŝtata. Ili konstruigis por sia servo domon kun areo de 300 kvadrataj metroj, aĉetis fotografilojn, fotobriligilon kaj instrumentojn por rivelado, pligrandigo, kopiado kaj kolorigo. La totala enspezo de ilia fotografado en la unua duonjaro estis 100,000 juanoj. Nun la 38 gejunuloj de tiu fotoservo enspezas po 59-80 juanojn

ĉiumonate, iom pli multe ol tiuj, kiuj laboras en la ŝtata foto-studio.

Sub la organizado de la labora fako de Chongwen-distrikto, la tieaj gejunuloj laŭ la lokaj kondiĉoj starigis apud aŭtostacioj kaj domegoj, en bazaroj kaj sur stratoj 48 servopunktojn, kiel tetrinkejo, kukobutiko, drinkejo, manĝejo, gastejo, transportostacio kaj barbirejo. Tiuj malgrandaj entreprenoj estas simple ekipitaj, tamen tre prosperaj.

DAŬRIGO DE TRADICIAJ METIARTOJ

Kiel antikva kultura urbo, Bejing havas multajn memorindajn historiajn kaj turismajn lokojn, kiuj ĉiutage altiras dek-milojn da ĉinaj kaj alilandaj turistoj. Ĉe ĉiu tia loko la turistoj volas aĉeti iujn memoraĵojn. Sed dum sufiĉe longa tempo la tradiciaj metiartaĵoj kiel la famaj vitraj vinberoj, argilaj homfiguroj k. a. estis neaĉetebblaj, ĉar mankis daŭrigantoj de tiuj metiartoj. Mi informiĝis, ke antaŭe en Chongwen-distrikto multe produktiĝis specialaj metiartaĵoj. Por havigi laboron al gejunuloj, la distrikta labora fako helpis gejunulojn en fondado de metiejoj por produkti inkrustaĵojn, vitrajn vinberojn, silkajn tapiŝojn, brodaĵojn k.a.

Li Qishan de la klozonea laborejo de la Yihua-a Inkrustaja Metiejo estis unu el la tri famaj majstroj de tiu metiejo. Li havas 50-jaran sperton en klozonea produktado. Li jam emeritiĝis. Post fondo de tiu metiejo oni invitis lin labori kiel ĝia teknika konsilanto. Li ini-

cas 18 metilernantojn. Li diris: "Mi nepre lernigos al la gejunuloj mian tutan arton." Sub lia direktado la 22-jara Fu Bingxiang, post nur du jaroj, jam ellernis la tutan procedon de klozonea produktado kaj kuraĝis renovigi sian teknikon. La de li faritaj kateto kaj simieto estas versimilaj kaj delikataj kaj ricevis aŭdojn de la klientoj.

AMO AL SIA LABORO

Multaj gejunuloj ricevis laboron kaj ekhavis regulan enspezon, ke okazis rimarkinda ŝanĝo al ilia materia vivo kaj spirita fizionomio.

Intelekta junulo Nan Baotai edziĝis en farmejo de nord-orienta Ĉinio. Poste li revenis al Bejing kun sia edzino kaj infano kaj fariĝis senokupa dependanto ĉe la gepatroj. Pli poste, la juna geedza paro ricevis laboron en fabriko de kolektiva posedanteco. Ĉiumonate ambaŭ ili enspezas 120 juanojn. Kun garantio de vivteno ili laboras nun tre entuziasme.

La stabila vivo havigis bonajn kondiĉojn al gejunuloj por lerni sciojn kaj teknikojn. Nemalmultaj el ili studas en televizia universitato, postlabora lernejo aŭ teknika kurso. La antaŭaj ŝako-maniuloj kaj poker-maniuloj fariĝis libro-maniuloj kaj maniuloj de teknika renovigo. Ĉiutage post laborado la junuloj duope aŭ triope hastas al la laborista kultura domo, kie funkcias stacio de teknika interŝanĝo kaj kursoj de tajlorado, fremdaj lingvoj, pentrado k. a.

Post diplomitiĝo el supera mezlernejo en 1978, Dong Huanjun eklaboris en la Yihua-a Inkrustajo-Metiejo. Li modeste lernas de sia majstro kun penemo. Nun li jam posedas la kompletan teknikon por fari klozoneon. Foje lia majstro diris, ke li projektu ovalan drinkilaron. Uzante scion pri analiza geometrio, kiun li lernis en la supera mezlernejo, li desegnis precizan ovalon. Kaj pro tio lia majstro laŭdis lin. Dong Huanjun kore ekamis sian laboron. En la kuranta jaro li estis elektita kiel juna sturmanto de Ĉinio.

Sub la direktado de majstro, junaj laboristoj de la loĝkvartala lignajista grupo faras meblojn.



Pri la spezo de iu laborista familio

Estimata sinjoro Itai Kijoŝi,

En via letero vi esprimis vian deziron informiĝi pri la spezo de ĉina mezklasa familio. Por vin kontentigi, lastatempe mi vizitis laboristan loĝ-kvartalon de la Beijing-a Dua Aŭto-fabriko, kaj detale informiĝis pri la spezo kaj ĉiutaga vivo de la familio de laboristo Xing Shimin.

Xing Shimin, 45-jara, estas sepaklasa elektristo de la Ĝenerala Muntejo de la Dua Aŭto-fabriko. Lia kvar-membra familio loĝas en apartamento kun plankareo de 33 kvadrataj metroj en la kvara etaĝo de loĝdomo nemalproksima de la fabriko. La ĉambroj estas puraj kaj orde meblitaj per vestoŝranko, komodo, led-kofro, faldeblaj seĝoj, foteloj, radio-ricevilo kaj blank-nigra televidilo. Ĉio ĉi

tio montras lertecon de la mastro.

Mi vizitis la familion ĝuste kiam ĉiuj ĝiaj membroj ĝuis ferion. La mastro preparis tagmanĝon en la kuirejo. Ŝia juna filino Wenjie laŭtleĝis ion en fremda lingvo surbendigante sian voĉon. Xing Shimin, la mastro, akvumis florojn kaj nutris orfiŝojn sur la balkono. Informiĝinte pri mia celo, li ekridis serene, kaj diris montrante sian edzinon: "Turnu vin al la mastro por informiĝi pri tiuj mastrumaj aferoj." Sinjorino Xing do konigis al mi la monatan enspezon de la familio. Ĉiumonate Xing Shimin akiras salajron de 86.4 juanoj (1 juano = 0.6708 usona dolaro), produktan premion de 13 juanoj kaj bonstatigan nutran, banan

kaj razan subvencion de 4 juanoj, ĉar ekde 1978 la fabriko prove praktikas premian sistemon kaj samtempe altigis la kolektivan bonstatigan sumon. Ŝi mem laboras en la farejo de akcesorajoj de la aŭtofabriko, kaj akiras monatan salajron de 40 juanoj, premion de 5 juanoj kaj bonstatigan subvencion de 4 juanoj. Ilia plej aĝa filino Wenfang estas laboristino de alia proksima fabriko. Ŝi akiras monatan salajron de 36 juanoj, premion de 15 juanoj kaj bonstatigan subvencion de 3 juanoj. Laŭ decido de la Beijing-a popola registaro, ĉiumonate ili ricevas, kiel la aliaj salajratoj, 6-juanan trafikalan subvencion kaj 15-juanan monhelpon por flankmanĝaĵoj. (En novembro de 1979, nia ŝtato altigis la prezon de la de ĝi aĉetataj agrikulturaj produktaĵoj kaj ekde tiam donas al ĉiu laboristo aŭ oficisto 5 juanojn ĉiumonate kiel monhelpon.) Totale la familio enspezas ĉ. 230 juanojn monate.

Pri la elspezo sinjorino Xing diris: "Ĉiumonate ni pagas 4.7 juanojn por lu-prezo de la apartamento, kaj 2.5 juanojn por akva kaj elektra kosto. Tiuj du monsumoj konsistigas 3.4% de la totala enspezo, kaj krome, 15 juanojn por cigaredoj, 2.7 juanojn por gaso, 3 juanojn por viziti kinejon aŭ teatron. (Ordinare, filma bileto kostas 0.3 juanon kaj teatra bileto 0.5 juanon. Tiurilate la fabriko ĉiumonate monhelpas per 0.5

Xing Shimin (la dua de maldekstre) kaj liaj familianoj



juano al ĉiu oficisto aŭ laboristo.) Unu-semestra lernokotizo por la plej juna filino estas 5 juanoj, vintre, la varmigan koston pagas la ŝtato. La tri salajratoj de la familio ĝuas senpagan kuracadon. Por konsulti kuraciston en la fabrika kuracĉambro, ni pagas nur 0.05 juanon kaj senpage ricevas medikamentojn. La lernanta filino ĝuas duon-pagan kuracadon, ĉar la ŝtato pagas duonon de la kurackosto de la malpli-ol-18-jaraj gefiloj de la oficistoj kaj laboristoj de fabrikoj.” Kiel ĉiuj civitanoj de la Respubliko, sinjoro Xing kaj liaj familianoj ne pagas individuan enspezan imposton kaj socian asekuran sumon.

Sinjorino Xing zorgas pri vestoj, manĝoj kaj ĉiutagaj vivbezonoj de la tuta familio. Kun rideto ŝi diris: “Ni elspezas pli parton de la ricevita mono por nutro, ekzemple, 90 juanojn por manĝo, ĉirkaŭ 50 juanojn por bombonoj, fruktoj kaj kukoj, 3.75 juanojn por bovin-lakto por sinjoro Xing. Post la elspezoj, ni havas 40 juanojn ĉiumonate kiel ŝparmonon.” Poste ŝi detale parolis al mi pri ĉiutagaj manĝoj. Ordinare, kiel matenmanĝon ili mem bakas kukon aŭ aĉetas en apuda butikoj soj-lakton kaj fritkukojn; tagmanĝon ili prenas en la manĝejo de la fabrikoj; kaj vespermanĝon ili preparas hejme. Dimanĉe ili havas kompare pli bonajn manĝojn kun pli da plaĉaj pladoj.

Sen glaci-ŝranko, ŝi devas aĉeti legomojn kaj viandon ĉiutage, same kiel aliaj familioj. Dum vintro ŝi povas unufoje aĉeti sufiĉe da tio por tut-semajna bezono, t. e. 3-4 kilogramojn da porkaĵo, 1.5 kilogramojn da ovo, tri kilogramojn da sojfabaj produktadoj kaj unu kilogramon



Tagmanĝo en ferio

da kolbaso, kaj fridigas ilin sur la balkono. Legomojn ŝi aĉetas ĉiutage dum hejmeniro post deĵoro. En printempo kaj somero, legomoj estas abundaj kaj multspecaj, da ili ŝi povas aĉeti laŭbezone. La prezoj de legomoj en Bejing varias laŭ la sezonoj. En abunda sezono ili kostas meznombro 0.2 juanon por unu kilogramo, dum malabunda sezono la prezo leviĝas du- aŭ trioble. Porkaĵo kostas malsame laŭ kvalito, ĉiu kilogramo maksimume 2.6 juanojn. La prezoj de fiŝoj diferencas laŭ specoj, ĉiu kilogramo kostas de 0.7 juano ĝis 2 juanoj. Kokovoj kostas 2.4 juanojn po kilogramo, koko maksimume 3.2 juanojn kaj anaso 2.6 juanojn po kilogramo.

Responde al mia demando pri la elspezo por vestaĵoj, sinjorino Xing diris: “Mi ne povas precize respondi kiom ni elspezas tiuflanke. Mi, mia edzo kaj mia plejaĝa filino portas dum laboro vestojn donitajn de la fabriko. Ni portas niajn flanelajn kostumojn nur en festoj kaj liberaj tagoj. La plej juna filino estas lernantino kaj ne bezonas

multan monon por vestoj. Tamen ŝi bezonas magnetofonon por lerni fremdan lingvon kaj tion ŝi jam havas. Nur la plej aĝa filino emas sin beligi kaj elspezis cent juanojn por aĉeti ŝtofon ekde la pasintjara somero ĝis nun.” Tiam ruĝiĝis Wenfang kaj okulumis al la patrino. Sinjorino Xing ekridis plezure kaj diris: “Do, al la gasto mi ne plu malkaŝos viajn sekretojn.”

Tiam Wenjie metis la preparitajn manĝaĵojn sur la manĝotablon. La gemastroj afable petis min kun ili manĝi, mi do altabliĝis. Vere riĉa manĝo. Rizajo kun kvin pladoj: frititaj porkhepato, kok-ovaĵo kaj porkaĵo kun kapsiko, frikasita fiŝo kun bruna saŭco kaj salato el kukumo, kaj ankaŭ tomato-suppo kun porkaĵo.

La mastrino sincere klarigis: “Tiujn pladojn ni kuiris ne speciale por vi.” Vere, mia observo konfirmis ŝiajn vortojn. Manĝante ni babilis plue. Mi informiĝis ke gesinjoroj Xing maltrankviliĝas ne pri siaj vivo kaj laboro, sed nur pri tio ĉu la juna filino sukcesos en la en-ira

ekzameno de alta lernejo. Ili ambaŭ kaj la plej aĝa filino havas nur mezgradan edukitecon, kaj tre volas ke estu studento en la familio. Wenjie estas gracia knabino, diligenta kaj inklina al literaturo kaj verkado. Ŝi diris: "Ĉijare mi anoncos min al la ĉin-lingva fakultato de la Bejing-a Universitato kaj tiu de la Ĉina Popola Universitato. Se mi malsukcesus, mi provus venontjare!"

Post la tagmanĝo, Xing Shimin akompanis min rigardi florojn sur la balkono. Li diris ke li tre ŝatas kulturajn florojn kaj bredi orfiŝojn post laboro. Kiel multaj floroj en la potoj: peonio, diversformaj kaktoj, rozo, granatujo kaj oranĝujo. Sube estas akvario. En ĝi amin-daj orfiŝoj grandaj kaj malgrandaj petolante naĝas inter ceratofiloj.

Por helpi al mia celo, Xing Shimin gvidis min al siaj najbaroj. Iuj el ili vivas pli bone ol li, havas lavmaŝinon, elektran ventumilon kaj aliajn pli kostajn vivbezonaĵojn, dum aliaj vivas malpli bone ol li, ĝenerale pro tio ke ili havas pli multe da gefiloj kaj tiel portas pezan ŝarĝon. Por ĉinaj oficistoj kaj laboristoj en urboj la plej grandaj problemoj estas manko de loĝdomoj kaj la atmosfera polucio kaŭzita de industriigo. Tiujn problemojn la popola registaro jam atentis kaj solvas paŝon post paŝo.

1. La urbo Chongqing
2. Quzhou-gubernio de Hebei-provinco
3. La urbo Nanjing
4. Qufu de Shandong-provinco


ĈEL FARIGIS ALIĜINTA LANDA ASOCIO DE UEA

Je la 5-a de aŭg. 1980, la Komitato de la Universala Esperanto-Asocio pasigis en Stokholmo la rezolucion pri akcepto de la Ĉina Esperanto-Ligo kiel aliĝinta landa asocio de UEA.

Kiam oni deklaris la rezolucion pasigita, ĉiuj ĉeestantaj komitatanoj varme aplaudis por esprimi sian bonvenigon. Tuj poste, Zhang Qicheng (Ĉ. Ĉen), ĝenerala sekretario de ĈEL, faris mallongan paroladon por danki ilin pro ilia subteno. Li diris, ke ĈEL plifortigos kunlaboron kun UEA en estonteco kaj klopodos por disvastigi kaj uzi Esperanton.

Laŭ la Statuto de UEA, Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de ĈEL, kaj Ye Junjian (Cicio Mar), membro de la Konsultanta Komitato de ĈEL, ekfunkciis kiel membroj de la Komitato de UEA.

LOKOJ MENCITAJ EN TIU ĈI NUMERO





NOVAJ POPOLAJ REGISTRAROJ ELEKTITAJ EN ĈINIO

29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio okazigis sian popolan kongreson, balote elektis sian konstantan komitaton de la popola kongreso kaj fondis sian popolan registaron por anstataŭi la antaŭan revolucion komitaton. En tiuj novaj popolaj registaroj troviĝas diversfakaj specialistoj kaj sciencistoj pli multaj ol iam ajn antaŭe. Kvin naciminoritataj kadroj prenis sur sin la prezidantecon de la popola registaro respektive de siaj naciminoritataj aŭtonomaj regionoj. Iuj patriotoj kaj membroj de demokratiaj partioj denove ekhavis gvidan oficon en regpotencaj organoj.

MEMDECIDAJ RAJTOJ PLIIGITAJ EN ĈINAJ ENTREPRENOJ

Ĝis la fino de junio, 6,600 ĉinaj entreprenoj pliiĝis siajn memdecidajn rajtojn post plenumo de la ŝtata plano kaj rikoltis relative bonajn ekonomiajn rezultojn. Ili konsistigas 16% de la ĉinaj industriaj entreprenoj de tutpopola posedanteo, kaj iliaj produktovaloro kaj profito konsistigas respektive ĉ. 60% kaj 70%. Sub tia nova sistemo, la entreprenoj rajtas ellabori sian produkt-planon, disponi fonduson kaj krudmaterialojn kaj rezervi parton de la pliiĝita profito por plibonigi siajn maŝinojn kaj la bonstatajn kondiĉojn de laboristoj. La pliigo de memdecidaj rajtoj ebligis al la entreprenoj kaj iliaj laboristoj plene disvolvi sian aktivecon kaj al la tuta ekonomia laboro sin progresigi.

PLUA PROSPERIĜO DE ĈINAJ URBAJ KAJ KAMPARAJ Merkatoj

De januaro ĝis junio, la totala enspezo de la podetala vendo de la ĉinaj urbaj kaj kamparaj merkatoj

atingis 101,370 milionojn da juanoj, je 15,790 milionoj pli multe ol tiu en la sama periodo de 1979. Tio estas malofte post la fondiĝo de nia popola respubliko.

La enspezo de vendo de porkaĵo, ŝafajo, bovaĵo, kortbirdoj, ovoj kaj akvaj produktaĵoj kreskis je 40% kompare kun tiu en la sama periodo de 1979. Nun en la urboj kaj la kamparo prosperas la vendado de bombonoj, kukoj, etmanĝaĵoj, trinkaĵoj kaj aliaj. Escepte de akvaj produktaĵoj kaj legomoj nesufiĉaj por iuj urboj, ĉiuj aliaj almanĝaĵoj estas kompare abundaj.

Ĉiam pli kreskis la bezono de la konsumantoj pri kompare altvaloraj produktaĵoj. Kaj multe pliiĝis la vendokvanto de televidiloj, kudromaŝinoj, bicikloj, elektraĵoj ventumiloj, lavmaŝinoj k. a.

94,000 HEKTAROJ DA VIRGA TERO EKSPLUATITAJ

En la unua duono de la kuranta jaro en Heilongjiang-provinco de nordorienta Ĉinio estis ekspluatitaj 94,000 hektaroj da virga tero, inter kiuj duono estis kulturata por sojfabo kaj tritiko. Nun bone kreskas la plantoj sur tiuj novaj kampoj kaj esperebla estos riĉa rikolto.

Tiu provinco havas pli ol 3 milionojn da hektaroj da virga tero ekspluatebla. Por konstrui sin kiel eble plej rapide en la bazon por liveri grenon kaj sojfabon al la ŝtato, tiu provinco klopodas unuflanke por altigi la po-hektaran produktokvanton de la ekzistantaj agroj kaj aliflanke por laŭplane ekspluati virgan teron.

LUKSAJ TAPIŜOJ FARITAJ EN ĈINIO

La luksa tapiŝo kun 200 vefteroj kaj 200 varperoj en ĉiu kvadrata futo kaj kun fama ĉina Dunhuang-fresko kiel desegnaĵo estis provfarita lastatempe de la Tianjin-a Tapiŝa Instituto laŭ klasika modo kaj komencis produktiĝi.

Tiu nova produktaĵo kun la ĉina nacia ko'oro estas delikata kaj bonkvalita, kiel la ĉinaj permanente faritaj lantapiŝoj, kaj farata per nova tekniko en ĉiuj labor-procedoj, tiel ke ĝi prezentas klarajn strekojn kaj vivecajn hom-figurojn. Ĉinio havas la tapiŝ-produktan historion de pli ol 3,000 jaroj. Kaj ĉina tapiŝo havas reputacion en la mondo pro sia originala arta stilo kaj la supre diritaj superaĵoj.

ĈINAJ EKSPORTAĴOJ PLIIGITAJ

En la unua duono de la kuranta jaro, la totala valoro de la ĉinaj importitaj kaj eksportitaj varoj atingis 25,660 milionojn da juanoj, t.e. 20.2% pli multe ol tiu en la sama periodo de 1979. Inter tiom da juanoj la totala valoro de la eksportitaj varoj atingis 12,930 milionojn, t.e. 35.5% pli multe ol tiu en la sama periodo de 1979, kaj la totala prezo de la importitaj varoj atingis 12,730 milionojn, t.e. 7.8% pli multe ol tiu en la sama periodo de 1979. Inter la eksportitaj produktaĵoj, tiuj de la peza industrio kreskis je 86.8% kompare kun la sama periodo de 1979 kaj superis la proporciojn de la produktaĵoj de la malpeza industrio kaj agrikulturo en la totala sumo de la eksportitaj varoj.

ARTEFARITA SANGO EKUZITA EN ĈINIO

La artefarita sango el kombinaĵo de fluoro kaj karbono estis sukcese ekuzita en Ĉinio. Ĝi estis farita de la Shanghai-a Instituto pri Organika Kemio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Tria Armea Medicina Instituto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo post la 5-jara studado. Tia artefarita sango sen distingo de sangotipo estas lakto-blanka kaj universale uzebla por ĉiuj homoj. tiel ke la paciento povas liberiĝi de kruciĝa infekto. Kaj krome, pro sia kemia stabileco ĝi povas esti grandkvante produktata kaj konservata pli longe ol la homa sango.



Prof. Chou Io en laboro

NIA KULTIVEJO



MI KAJ ESPERANTO

de CHOU IO

ANTAŭ 50 jaroj mi eklernis la sciancan lingvon Esperanto. De la komenco mi amas ĝin kaj nun mi restas ankoraŭ fidela esperantisto.

En 1929, kiam mi vizitis mal-superan mezlernejon en Ningbo, mi vidis ĉe mia frato korespondan instruan materialon de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Mi petis de li la materialon kaj komencis mem lerni.

La sekvantan jaron mi veturis al Shanghai (Ŝanhajo) por viziti superan mezlernejon. En la unua tago de mia atingo, mi vizitis la Ŝanhajan Esperanto-Asocion. Poste mi frekventis ĝin ĉiusemajne, kaj tie mi konatiĝis kun Hujucz, Bakin, Sheng Guocheng, A. A. Sofio kaj aliaj kamaradoj. Post nelonge en la lernejo mi fondis la Lida-an Esperanto-ligon, funkciigis Esperantan kurson kaj invitis s-ron Hujucz doni al ni lecionojn. Ni ankaŭ eldonis la gazeton "Dissemisto" ĉefe en la ĉina lingvo kun malmulte da esperantigitaj antikvaj poemoj. Poste mi konatiĝis kun samideano Lu Jianbo, Deng Tianyu kaj lia edzino. Preskaŭ ĉiudimanĉe ni kunestis por Esperan-

ta konversacio. Kelkiam mi vizitis Bakin. En tiu tempo mi korespondis kun pluraj fremdlandaj amikoj. La sovetia hortikulturisto I. V. Miĉurin estis unu el ili. Laŭ lia peto mi sendis al li ĉinajn fruktosemojn. Nia korespondado daŭris ĝis 1934.

En 1932-1936, mi studis en la Nantong-a Agronomia Instituto. Ofte kiam mi estis preterpasanta Shanghai, mi venis al tiu urbo. Tiam la Ŝanhaja Esperantista Ligo jam estis starigita kaj mi frekventis ĝin. En la ligo mi konatiĝis kun Zensto, Zhang Qicheng (Ĉ. Ĉen), Eltunko kaj aliaj kamaradoj. Mi tradukis la dramon de la nederlanda esperantisto H. J. Bulthuis "Malriĉa en Spirito" el Esperanto en la ĉinan lingvon, kaj mia traduko estis publikigita de la Ĉina Eldonejo. Mi mem aperigis "Pomarono de Chou Io", inkluzive de poemoj tradukitaj el Esperanto. En Nantong mi organizis la Esperantan Asocion de la Nantong-a Agronomia Instituto.

En 1934 mi fariĝis ĉefredaktoro de la instituta bulteno kun Esperanta nomo. En la sekvanta jaro mi fondis la Asocion de Insekta Intereso kaj aperigis

la bultenon "Insekto Interesa" kaj ĝian aldonon "Ĉinaj Entomologoj", ĉiuj kun Esperantaj nomoj. Ankaŭ la titoloj de la artikoloj kaj iuj resumoj estis esperantigitaj. Mi korespondis en Esperanto kun multaj fakaj organizoj kaj entomologoj de fremdaj landoj kaj interŝanĝis eldonaĵojn. La fama japana entomologo Teiso Esaki estis unu el miaj korespondaj amikoj.

En 1936 mi vojaĝis al Italio por studado. Ĉar mi ne sciis la italan lingvon, mi kunportis la Esperanta-Italan kaj Itala-Esperantan Vortarojn. En la itala antikva urbo Peruĝo mi hazarde konatiĝis kun kontraŭfaŝisma advokato A. Abatini. Li ordonis, ke lia bela filino Marcella — mezlernejanino — instruu al mi la italan lingvon. Nur post tri-monata helpado de Esperanto kaj la instruistino, mi povis verki poemon kaj skribi leteron en la itala lingvo. En tiu tempo mi ĉinigis la Esperantan "Taglibron de Vilaĝpedelo" de la danlanda verkisto St. Blicher.

Por partopreni en la Kontraŭjapana Rezistmilito, mi revenis al la patrolando en 1938. Post tio mi instruis en la Nordokcidenta Agronomia Instituto en

Shaanxi(Senhi)-provinco kaj rekomencis la internacian korespondadon. En korespondado mi unuflanke malkaŝis perfortaĵojn de japanaj militaristoj en Ĉinio kaj aliflanke kolektis bildojn kaj poŝtmarkojn.

Post la venko de la Kontraŭ-japana Rezistmilito mi kaj alia samideano Lu Jinsheng starigis la Instituton Entomologian de Chou kaj eldonis la revuon "Entomologio Ĉina" kaj ĝian aldonon "Informo de Entomologio". En 1949, mi deklaris, ke tiu instituto kaj ambaŭ periodaĵoj prenos Esperanton kiel internacian lingvon, oni uzos Esperanton ne nur por la nomoj de la instituto kaj ĝiaj gazetoj, sed ankaŭ por la titoloj de la artikoloj kaj iuj resumoj, kaj uzados ĝin en korespondado.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, mi kaj kamarado Lu Jinsheng fondis la Esperantan Asocion de la Nordokcidenta Agromonia Instituto kun pli ol cent membroj, starigis dufoje Esperantajn kursojn kaj aperigis la organon "Verda Ĝardeno". Samtempe mi kun Zheng Zhuyi, Xu Jifang kaj aliaj kamaradoj stari-

gis la preparan grupon de la Xi-an-a Esperantista Asocio.

Mi okazigis Esperanto-ekspoziciojn en Wugong kaj Xi'an. La Esperantaj eldonaĵoj konservataj de mi kaj la bildoj, poŝtkartoj kaj serioj da poŝtmarkoj senditaj de miaj fremdlandaj amikoj plenigis la tutan ekspoziciejon kun areo de 80 kvadrataj metroj. La ekspozicio interesis multajn vizitantojn.

En 1951 mi kaj 19 agronomoj (profesoroj kaj vicprofesoroj) aperigis publikan leteron al la mondaj progresemaj sciencistoj, ke ili verku sciencajn disertaĵojn kaj resumojn en Esperanto kaj plene uzu la sciencan lingvon Esperanto, por ke la sciencoj vere fariĝu komuna riĉaĵo de la homaro. Nia letero altiris al si atenton de diversaj rondoj kaj ni ricevis multajn leterojn simpatiajn kaj subtenajn. De tiam mi korespondis kun dekoj da esperantistoj de diversaj landoj kaj raportis al ili pri ŝanĝiĝoj de la nova Ĉinio kaj interŝanĝis kun ili spertojn pri scienca esploro.

En 1979, mi fondis la internacian fakan gazeton "Entomo-

taxonomia" (Insekta Klasifiko), kies redaktaro konsistas el 22 famaj entomologoj de ses landoj, inkluzive de Ĉinio. En la redakcio Lu Jinsheng, Li Kexi kaj mi estas esperantistoj. En la gazeto ni refoje deklaris uzi Esperanton kiel sciencan lingvon por verki disertaĵojn kaj resumojn. Nun la gazeto havas rilatojn kun 200 organizoj de 60 landoj kaj regionoj. Ni korespondas en Esperanto ankaŭ kun entomologoj de diversaj landoj. Antaŭ nelonge usona entomologo Lanna Cheng kaj ŝia edzo s-ro R. A. Lewin vizitis Beijing, kaj mi speciale veturis al tiu urbo por intervidiĝi kun ili. Tia amikeco naskiĝis dank' al Espkorespondo. Laŭ nia opinio, Esperanto devas esti uzata ne nur por propagando kaj literatura verkado, sed ankaŭ por sciencaj kaj diversaj sociaj aktivecoj, nur tiel Esperanto povas disvolviĝi rapide.

En Xi'an kaj Wugong troviĝas multaj fervoraj esperantistoj kaj aprobantoj de Esperanto. Nun ni faras preparan laboron por starigi la Xi-an-an Esperanto-Asocion.

ABON-VARBADO DE EPCĤ POR 1981

20% DA RABATO AL NOVA ABONO!

La abonanto-varbado de EPCĤ por 1981 jam komenciĝis kaj daŭros ĝis la 31-a de januaro, 1981. Ĉiuj, kiuj abonos EPCĤ-on en tiu ĉi tempo, povos ĝui rabaton de 20%. Ne perdu la ŝancon kaj tuj abonu ĝin, kaj rekomendu ĝin al viaj parencoj kaj amikoj. Ĉiu, kiu varbos abonantojn por ni, ricevos rekompencan kun ĉina originaleco, donacitan de Guoji Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj).

ABONTARIFO DE EPCĤ

12 numeroj (1 jaro)	£3.00	US\$ 6.00	Gld.12.60	Yen1400
24 numeroj (2 jaroj)	£5.00	US\$10.00	Gld.21.00	Yen2800
36 numeroj (3 jaroj)	£7.50	US\$15.00	Gld.31.50	Yen4000
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
12 numeroj (1 jaro)	£2.20	US\$4.30		
24 numeroj (2 jaroj)	£3.60	US\$7.20		
36 numeroj (3 jaroj)	£5.40	US\$10.80		

SPECIMENOJ SENPAGE AKIREBLAJ LAŬ PETO

Abonu ĉe: Peranto en via loko

Esperanta Sekcio de Guoji Shudian, P. O. Kesto 313, Beijing Ĉinio



Liu Ren kaj Verda Majo en 1936

EN la Virina Festo de 1940 ŝi verkis artikolon “Unuiĝu la Ĉinaj kaj Japanaj Virinoj”. Ŝi diris: “Sinjoro Mao Zedong diris: ‘La tago, kiam la virinoj de la tuta Ĉinio liberiĝos, estos la tempo de la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito por la tuta nacio’, oni do ankaŭ povas diri: ‘La tago, kiam la japana faŝismo disfalos, estos la tempo de la liberiĝo por la japanaj virinoj’. Kiel plifruigi la alvenon de tiu tago? Tio estas la komuna problemo por la virinoj de la du landoj.”

Dum ŝia loĝado kaj laborado en Chongqing, okazis la Evento de Suda Anhui de 1941 kaj aliaj kontraŭkomunismaj tajdoj, kaj ŝi ekkonis la veran vizaĝon de la kuomintang-reakciularo. Post la evento, Verda Majo esperantigis la romanon “Vivantaj Soldatoj” de japana verkisto Isikava Tacuzo. La

Rememoro pri Verda Majo, kunbatalantino de la Ĉina Popolo

(Daŭrigo)

romano malkaŝis la kruelan krimon de japanaj militistoj. La romano estis eldonita de la Redakcio de “Heroldo de Ĉinio”. En la 27-a de julio de tiu ĉi jaro, en kunveno de Chongqing-aj kulturaj rondoj Verda Majo intervidiĝis kun kamarado Zhou Enlai. Li ridete diris al ŝi: “La japanaj militaristoj nomas vin ‘koketa naciperfidulino’, fakte vi estas fidela filino de la japana popolo kaj vera patrioto!” Verda Majo diris en emocio: “Tio estas por mi granda kuraĝigo kaj plej alta rekompenco por mia bagatela laboro. Mi volantas esti fidela filino de la ĉina kaj japana popoloj!” En la 16-a de novembro de la sama jaro, kiam oni celebris la 50-an datrevenon de la naskiĝo de Guo Moruo kaj la 25-jaran jubileon de lia verkado, por esprimi sian gratulon al li, ŝi verkis poemon “Poeto de la Ŝtorma Epoko”, kiu estis publikigita en la tagjurnalo Xinhua. En la sama tago kamarado Guo Moruo skribis por ŝi poemon sur ruĝan silkaĵon, kiun ŝi alportis el Japanio:

Mallumo regadas sur vasta kamparo senlima,

Stelaro belegas sur tuta l' obskura ĉielo.

Rebrilo de neĝo montriĝas ja tro malproksima,

Prefere ni legas sub lampo kun ĉarma lumhelo.

(*Laŭ peto de sinjorino Verda Majo*)

Verda Majo estis esperanta verkistino kaj ankaŭ poetino. Pro la streĉa laboro kaj malfacila vivo, ŝi estis kaptita de ftizo kaj kuŝiĝis en lito, la “du ruĝaj pomoj” sur ŝiaj vangoj malaperis. En aprilo de 1939, en malsanula lito kaj kun sopiro al la patrino ŝi verkis longan poemon “Du Pomoj Perditaj”, en kiu troviĝas jenaj versoj:

La pomoj sur miaj vangoj malaperis iam,

Kiam ne scias mi, pardonu panjo.

Tamen certa mi estas, kiu ilin ja rabis.

Kaj tiu malamega man' estas la sama,

Kiu deŝiris ilin ankaŭ de l' centmiloj,

Milmiloj da gejunuloj kaj infanoj,

En ĉi tiu Ĉinio kaj Japani' patra mia.

Verda Majo estis optimisma eĉ en malsano kaj ĉiam havis esperon al la estonto. Ŝi verkis en malsano artikolon “Venas la Vintro, Ne foras do l' Printemp’”. Ŝi skribis: “Jam pli ol semajnon sunradioj ne vizitas mian malsanliton. Sed eĉ peceton da malgajo aŭ malespero mi ne sentas. Kontraŭe, ardiĝo de nova batalemo skuas mian febretran korpon. — Kun plena ĝojo kaj fiero mi deklaras, ke la ĉina popolo neniam sklaviĝos antaŭ perforto kaj

ĉinaj esperantistoj neniel perfidos la brillan stelon sur la brusto.”

En la posta periodo de sia loĝado en Chongqing, Verda Majo komencis verki sian membiografion “En Ĉinio Batalanta”, kiun eldonis la Koresponda Esperanto-Lernejo de Chongqing en 1945.

Je la 15-a de aŭgusto 1945 la japanaj agresantoj kapitulacis senkondiĉe. Triumfis la ĉina popolo, kiu rezistis ok jarojn la japanajn agresantojn. Tiutempe Verda Majo kaj ŝia edzo partoprenis en la laboro de la Demokratia kaj Politika Ligo de Nordoriento, veturinte kun la infanoj al Harbin de la Nordorienta Liberigita Regiono tra Shanghai. Tiam la kuomintangaj reakciuloj grandskale atakis la liberigitajn regionojn, sed ŝi estis fidoplena, eltenis provon de malfaciloj kaj instruis en la Nordorienta Universitato de Jiamusi. Estis neatendite, ke ŝi mortis post abortiga operacio en sia aĝo de 35 jaroj, je la 14-a de januaro 1947. Post tri monatoj, ŝia edzo Liu Ren mortis pro recidivo de renito. Ni perdis Verdajn Majon — kunbatalantinon de la ĉina popolo kaj bravan internacisman batalantinon kaj samtempe perdis du eminentajn esperantajn kamaradojn!

En Japanio Hasegaŭa Teru (Verda Majo) estas nomo respektata. En 1952 Japana Esperanta Servo eldonis ŝiajn verkojn “Historieto de Japana Literaturo”, “Flustr’ el Uragano”, kaj ŝian tradukaĵon “Vivantaj Soldatoj”. En 1954 Japana Esperanta Libro-eldona Ligo eldonis ŝian “En Ĉinio Batalanta”. En 1954 japana fama esperantisto Takasugi Iĉiro japanigis kaj eldonis ŝian “Flustr’ el Uragano” kaj en 1972 skribis artikolon pri Verda Majo por la gazeto Asahi. Ŝia membiografio “Mia Vivo” estis kompilita en la 8-an volumon de “Moderna Eduka Libraro”, eldonitan en 1959. Krome, Japanio eldonis ankaŭ “Elektitajn Verkojn de Hasegaŭa Teru”.

Ozaŭa Juki origine Niŝimura Jukiko, pliaĝa fratino de Verda

Majo, skribis artikolon “Pri Teru”, kaj publikigis ĝin en la 49-a numero de 1955 de la Esperanta gazeto “La Movado”. Je la 18-a de aŭgusto 1978, kiel membro de la Vizitgrupo al Ĉinio de japanaj amikoj de El Popola Ĉinio, la 69-jara Ozaŭa Juki vizitis Ĉinion kaj intervidiĝis en Beijing kun siaj genevoj Liu Xing kaj Liu Xiaolan. Kiam ŝi descendis la aviadilon, du junuloj nekonataj iris al ŝi por helpo, kun feliĉaj larmoj ŝi diris: “Nenion mi povas diri! Diru kion ajn estas nenecese! Ĉar niaj korsento kaj sango estas samaj! Mi trovis ke Xiaolan estas tute simila al sia patrino. Kiam ŝi subtenas min, mi sentas kvazaŭ ŝia patrino estus apud mi, manon en mano.” Verkistino Saŭaĉi Hisae, kiu faris la viziton kune kun Ozaŭa Juki, skribis en 1972 artikolon pri Verda Majo “Perfido kaj Amo al Sia Patrolando”, kaj publikigis ĝin en la aldono de “Ekonomia Revuo”. En 1976 ŝi skribis alian artikolon “Forgesita Vivo, Hasegaŭa Teru”, kaj publikigis ĝin en sinsekvaj numeroj de “Tokio Novaĵo”. Ŝi skribis: “En la 15 jaroj de nepacigebla milito kontraŭ Ĉinio, ekzistis nur unu homo, Hasegaŭa Teru, kiu estis fierinda kaj kara por ni.”

Japana verkisto Ione Koiĉi verkis “Vivo de Teru” ekde 1957, kiu eldoniĝis en Tokio en 1969, post dek-jara verkado kaj kvarfoja modifado.

Li diris, ke Hasegaŭa Teru, en tiuj ŝtormaj jaroj, estis japano, kiu vokis ne nur al Japanio sed ankaŭ al la tuta mondo. La biografio gajnis la Esperantan premion de Moriyama de Japanio.

Japana dramisto Iŭama Joŝiki, kiu iam vizitis Ĉinion, verkis televizion dramon “Hejmsopira Stelo” laŭ la aktivecoj de Verda Majo en Ĉinio. La reĝisoro estis Morikai Teiĝi. En la lasta decembro la Kontrakta Kompanio de Televidaj Programeroj de Japanio sendis filmistan grupon al Ĉinio por filmi eksterdomajn scenojn. La heroino estis rolita de la japana aktorino Kurihara Komaki fame konata de la ĉinaj spektatoroj. Liu Ren estis rolita de Gao Fei — aktoro de la Centra Brodkasta kaj Televizia Ensemblo. Ili unue venis al Shanghai, poste al Chongqing per aviadilo laŭ la rivero Changjiang (Jangzi) kaj filmis multajn neforgeseblajn scenojn. Tiu filmo produktita per unuafoja kunlaboro inter Japanio kaj Ĉinio estis jam prezentita en Japanio kaj Ĉinio. Kurihara Komaki skribis: “Ni vojaĝis laŭ la piedsignoj de Hasegaŭa Teru al Shanghai kaj Chongqing por filmado. Kvankam tio mallonge daŭris, tamen restis al mi nemalmultaj rememoroj. . . Mi multe spertis la ĝojon, ke la popoloj de ambaŭ landoj kune klopodas por krei verkon.

Sceno el la televida filmo “Hejmsopira Stelo”: Verda Majo kaj Liu Ren ĉe la bordo de Changjiang (Jangzi)-rivero





El Leteroj de Niaj Legantoj

Mi jam prelegis dufoje ĉe la Londona Esperanto-Klubo, kaj mi laŭdis vian helpon kaj amikecon, kaj mi forte substrekis vian deziron pliampleksigi kontaktojn inter ĉinaj esperantistoj kaj alilandaj samideanoj. Sekve mi vere esperas ke aliaj esperantistoj vizitos Ĉinion. Ju pli vasta kontakto inter niaj popoloj, des pli bona la interkompreniĝo.

Estas bedaŭrinde, ke vi enmetis en mia artikolo la vortojn "Kiam la Oklanda Alianca Armeo atakis Beijing en 1900" (sur p. 2, n-ro 4 de EPĈ, "Unu vido pli taŭgas ol dek aŭdoj"), kiujn mi ne skribis, ĉar Lord Elgin malkonstruis la Ĝardenon de Perfekteco kaj Ravo en 1860. En 1900 la Oklanda Alianca Armeo rabis la Malpermesitan Civiton kaj la Templon de Ĉiela Paco sed ne la Someran Palacon. Eble ne multaj viaj legantoj rimarkis la eraron. En Britio ni nun hontiĝas pri tiu ĉapitro de la historio. (Ni tre bedaŭras pro tiu eraro kaj petas pardonon de S-ino Durham. — La red.)

—NANCIE DURHAM, Britio

Mi legis kelkajn esperantajn bultenojn, gazetojn, sed el inter tiuj, la plej plaĉa, belaspekta, bonenhava estas via bulteno "El Popola Ĉinio". Mi elkore bondeziras al la redakcio

de El Popola Ĉinio, kiel dum la pasintaj 30 jaroj, tiel bonege disvolviĝi. Mi deziras el mia tuta koro, ke via bulteno restu almenaŭ samtiel bonega kaj belega, kaj ke ĝi atingu la plej multajn geesperantistojn, kiuj ne nur deziras ekkoni vian landon, sed kiuj deziras perfektigi en nia internacia lingvo.

—LADISLAO POHL, Rumanio

Okaze de la 30-a datreveno de la naskiĝo de via Revuo, mi permesas al mi sendi plej korajn bondezirojn, por ke ĝi restu daŭre, kiel estas ĝis nun, tre interesa, por ke ĝi montru al la legantoj vian belegan landon, ĝiajn problemojn, vian kulturon kaj arton, viajn atingojn sur ĉiuj kampoj, kaj fine viajn E-kontaktojn kun la tutmondaj gesamideanoj kaj por ke la nombro de legantoj ĉiam pli kaj pli kresku.

Samtempe mi korege dankas por ĉiuj sciigoj kaj novaĵoj, kiujn enhavas via revuo "EPĈ" kaj kiuj alproksimigis al mi vian landon.

—U. LANGOWSKA, Pollando

Nu, festeco certe ne estas la sola kvalito de 1980-5! La abunda floramaso ja havas du signifojn por mi: festo kaj novaj ekfloroj. La redakcia artikolo jam heroldas tion, kiam ĝi mencias la ĉinan kontribuon al la homaro.

Mi estas tre kontenta ke mi de nun povas vidi vin. Impresoj: kompetentaj homoj — serioza kaj afabla — bona laboretosoj — ejo ne tre vasta. La redakcio estas teamo —

tion mi sentas. La etoso estas tiel nervo-malstreĉa.

—JOOP VAN DER HOEVEN,
Nederlando

Al mi mankas nur priekonomiaj, precipe priagrikulturaj artikoloj kiuj antaŭe konsistigis pli grandan parton de la revuo, sed nun tute mankas.

—M. LUCIJAN, Jugoslavio

Via belaspekta bildkalendaro jam estas konata kaj ŝatata, sed ĝi estas — pro la kostoj — nur por amikoj de EPĈ kaj ne por amasvarbado. Tial mi sugestis, ke vi eldonu sufiĉan stokon de via unufovia kalendaro — kiel en la n-ro 12/1979 por amasvarbado por la venonta jaro. Sur la dorsoflanko vi povus presi varbtekston por EPĈ.

—LEOPOLD PATEK, peranto de
EPĈ en Aŭstrio

Estus tre utila se vi iam sukcesus presigi mapon de parto de Ĉinio (ni diru 1:1.000.000) de regiono priskribita en ĉeestanta artikolo tiel ke paŝo post paŝo viaj legantoj posedos mapon (landkarton) de tuta via lando (en Esperanto, ĉu?) — ĉar, bv. kompreni ke viaj lokonomoj sonas tiom strange ke oni (fremdlandano) tro malfacile sukcesas enkapigi ilin sen bildigi ĝian situon. (Ekde la n-ro 8 EPĈ aperigas skizajn mapojn kun gravaj lokonomoj menciitaj en tiu ĉi n-ro — La red.)

—G. OTTO VASKE, Brazilo

Mi pensas, ke la televida filmo priskribanta la du pionirojn por ĉina kaj japana amikeco ligiĝos kun la nuna amikeco inter la du landoj."

Verda Majo forestis jam 33 jarojn. Sed ŝia brila nomo, la

superba vivo kaj intima figuro ĉiam vivos en nia koro. Ŝi multe kontribuis per sia mallonga vivo al la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo kaj la Esperantomovado. Estis absolute ne hazarde, ke ŝi prenis Verdajn Majojn kiel sian

plumnomon. Ni deziras, ke ŝi ĉiam portu al ni Junecon, forton, ĝojon kaj esperon kaj ni marŝu antaŭen laŭ ŝiaj piedsignoj. Herediĝu de generacio al generacio la amikeco kaj kultura interŝanĝo inter la ĉina kaj japana popoloj!

Lerta bredistino de silkraŭpo — Pan Shuifeng

Silko estas ĉefa materialo por fabriki silkajon. Deantikve ĉinoj jam ŝatis fari diversspecajn ĉarmajn vestojn el silkajo.

Pan Shuifeng en Chengguan-komunumo de Deqing-gubernio, Zhejiang (Ĝegiang)-provinco, estas lerta bredistino de silkraŭpo. Ŝi havas 30-jaran sperton en bredado de silkraŭpo. La de ŝi breditaj silkraŭpoj estas bonkvalitaj kaj sekrecias kokonojn pli grandajn. La procedo de la elkoviĝo de silkraŭpo ĝis la kokoniĝo ĝenerale daŭras ĉ. 25 tagojn. La silkraŭpoj estas malfacile bredeblaj, la bredejo devas ne nur esti seninfektigita, sed ankaŭ teni konvenan temperaturon. En sia kreskado silkraŭpo devas senseliĝi kvarfoje. En ĉiufoja dormo-senseliĝo ĝi ne manĝas, nek moviĝas. Post la kvarfoja senseliĝo, ĝi kreskas rapide, kaj fine fariĝas kristala tutkorpe. Sekreciinte silkon, la raŭpo mem envolviĝis en la kokono kaj fariĝis krizalido. Tiamaniere, ĝi finis sian tutan vivon.

Fotoj de WANG SHOULIANG



Pan Shuifeng kolektas kokonojn.

En la bredejo



Silkraŭpoj



Diskutado pri projektitaj desegnaĵoj

Duflanka brodaĵo: karpoj


Junulinoj de la Chengdu-a Metiejo de Sichuan-brodaĵo

La Sichuan-brodaĵo estas unu el la fame konataj brodaĵoj de Ĉinio kaj havas historion de pli ol 1,600 jaroj. Ĝi povas vivece prezenti flo-rojn, birdojn, fiŝojn, insektojn, naturajn pejzaĝojn kaj personojn. Tiu brodaĵo ĝuas bonan famon enlande kaj eksterlande.

Por heredi kaj disvolvi la tradicion arton de Sichuan-brodaĵo, la Chengdu-a Metiejo de Sichuan-brodaĵo varbis en la lastaj jaroj nombron da junulinoj kun belartaj scioj. Dank' al zorgema kulturado de veteranoj, tiuj junulinoj nun jam povoscias projekti kaj brodi kaj elfaris multajn bonajn verkojn.

Fotoj de REN SHIYIN





Duflanka brodajo




Brodistino



1

1. 2. 3. Brodajoj



3



2

Blanknaĝila delfeno



Sanstata ekzameno

Blanknaĝila delfeno (*Lipotes vexillifera*) estas rara animalo unika en Ĉinio.

Ĝi vivas en Changjiang (Jangzi)-rivero. Dum miloj da jaroj oni malofte vidis ĝin. Helpataj de fiŝistoj, la sciencistoj de la Instituto pri Akva Biologio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaptis unu blanknaĝilan delfenon en januaro, 1980.

Antaŭ 20,000,000 jaroj, la praavo de la delfeno estis mamulo vivanta surtere. Poste pro la ŝanĝiĝo de la tero kaj akvo, ĝi translokiĝis en akvon. Por adaptiĝi al la vivkondiĉoj en akvo, ĝiaj antaŭaj membroj fariĝis naĝiloj, la postaj degeneris kaj fine malaperis, kaj ĝi mem transformiĝis en fiŝon. Ĝi spiras per pulmoj anstataŭ branko. Ĝi havas longan kaj platan buŝon similan al beko de anaso kaj akrajn dentojn. Ĝiaj

okuloj estas tre malgrandaj, kun grandeco de fabgrajno, kaj ĝia nazo estas malgranda ronda spira truo kreskanta sur ĝia verto. Ĝi havas tre bonan evoluintan son-produktan sistemon, per kiu ĝi povas trovi subakvan vivaĵon, distingi objekton kaj kapti nutraĵon. Tiu animalo havas evoluintan cerbon, kiu egalas al tiu de simio, kaj certgradan memoron kaj penspovon.

Fotoj de YANG XIUYUN

Specimeno de ina blanknaĝila delfeno kaptita en 1974 kun longeco de 253 cm. kaj pezo de 237 kg.

Blanknaĝila delfeno bredata en akvujo



“El Popola Ĉinio”

komencis eldoni ankaŭ

Novajn Librojn en Esperanto

Aŭtuno en la Printempo

*Mallonga romantika
romano de fame konata
ĉina verkisto kaj
esperantisto BA JIN*

Esperantigis Laŭlum
Ilustris Yao Youxin
148 × 210 mm. 116 paĝoj
Numero: 10-Es-1525

Prezo: broŝ. £2.40 US\$4.90
bind. £2.90 US\$5.90



El Ĉina Poezio

*Kolekto el 100 poemoj de
antikvaj kaj modernaj
poetoj en Ĉinio. La
tradukinto estas
eminenta ĉina
esperantisto
prof. S. J. ZEE.*

148 × 210 mm. 156 paĝoj
Numero: 10-Es-1526

Prezo: broŝ. £2.40 US\$4.90
bind. £2.90 US\$5.90



Mendu ĉe la loka peranto de EPC aŭ ĉe la ĝenerala distribuanto

Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

KIEL MI VIDIS ANTIKNAN KAJ NOVAN ĈINION

de CVETANKA TU-
BIĈ, Jugoslavio

EN 1974 en Beograd okazis ekspozicio sub la titolo: "La arto de antikva Ĉinio". La ekspozicio tiel forte impresis min, ke mi decidis viziti tiun landon tuj, kiam venos ŝanco. Kaj jen, fine de marto ĉijare, mia granda deziro estis realigita.

Per forta flugmaŝino, de Beograd ĝis Pekino ni flugis 14:20 h. kun haltado en Karaĉi je duon-horo. La tempo-diferenco inter Beograd kaj Pekino estas 7 horoj, kaj ni tuj akordigis niajn brakhorloĝojn kun la ĉinaj.

Ni loĝis en komforta Hotelo de Amikeco (Jou-ji). Ĉio estis kontentiga, eĉ luksa, kaj ni sentis nin agrable. En la sekvanta tago jam komenciĝis riĉa programo. Unue, ni vizitis la Grandan Muron (Ĉang-ĉeng). Ĝi estas konata en la mondo kiel unu el la plej malnovaj konservataj fortikaj objektoj. Neniu el la vizitantaj turistoj ne faras malgrandan

promenadon, kaj fotiĝas sur la murego por memoro. Ĉar la Granda Muro estas konstruita sur altaj montoj, ĉiam oni sentas blovon de vento. Ĝia serpenta figuro estas videbla de tre malproksime.

Samtage ni vizitis la imperiestran tombejon de la dinastio Ming. Detalan historion pri ĝi rakontis al ni la gvidanto. Estas tute alie vidi propraokule historian objekton, ol aŭdi aŭ legi pri ĝi.

En Pekino ni admiris la belecon kaj lukson de la Malpermesata Urbo, kies pavilonoj brilegas sub la suno. Tie troviĝas marmoraj pontetoj, skulptaĵoj, interna dekoracio de la plej granda arta valoro. La Malpermesata Urbo situas norde de la placo "Ĉiela Paco", kie troviĝas ankaŭ kultura kaj politika centro de Ĉinio.

Apartan ĝojon en Pekino mi havis je renkontiĝo kun ĉinaj esperantistoj. Jam el Jugoslavio mi skribis al la Ĉina Esperanto-Ligo, ke mi ŝatus kontakti kun ĉinaj esperantistoj, dum mia restado en Ĉinio. Kaj kia surprizo! Unu matenon serĉis min tri gekamaradoj, je la nomo de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj de la redakcio "El Popola Ĉinio", kies abonanto mi estas de multaj jaroj. Mia ĝojo estis senfina, kiam mi povis libere paroli kun ĉinoj sen helpo de interpretisto. Afabla kamaradino Zhou Qian-yun, kaj kamaradoj Zhu Mingyi kaj Ĝang Hajping, dediĉis al mi tutan antaŭtagmezon. Je la nomo de Jugoslavia Esperanto-Revuo "Voĉo", mi transdonis al ili la libron "Montara Krono".

Miaj karaj novaj geamikoj montris al mi la Someran Pala-

con. En pitoreska parko de klasika ĉina stilo, troviĝas reĝa palaco kun multaj pavilonoj, kiuj estas konstruitaj sur la monteto Vanŝou (Longa vivo). Antaŭ la Somera Palaco estas bela lago. Ĉio tio, — arkitekturo, ornamaĵoj, parko, longa koridoro por promenado, kie estas 8,000 diversaj bildoj, pentritaj en malnova ĉina stilo, kaj ponto kun 17 arkoj, ŝajnas esti "fabela urbo". Per simplaj vortoj ne eblas priskribi la belecon de la naturo kaj de ĉio alia farita de homoj.

Sekvanta urbo, kiun ni vizitis, estis Nanjing (Nankino), ĉefurbo de la riĉa provinco Jiangsu. Ĝi situas sur la bordo de rivero Yangzijiango (Jangzi-rivero). Admirinde, estas 200,000 platanoj sur la stratoj. Nun tiu industria urbo kun belaj parkoj, monumentoj kaj kun riĉa historia pasinteco estas ofte vizitata de turistoj.

Ni vidis la maŭzoleon de dr. Sun Jat-sen sur la pinto de monto "Purpura Oro". Doktoro Sun estis fama ĉina gvidanto de nacia respublika movado ekde 1905. Ni vidis ankaŭ grandiozan ponton super la rivero Yangzijiango kies longeco estas 6,700 metroj, kaj ĝiaj du niveloj estas por fervoja kaj ŝosea trafiko. Parkoj kun artefaritaj lagetoj ofertas ĝuon kaj refreŝigon al ĉiuj, kaj ŝipveturado sur la "flava rivero" restos neforgesebla. Arkeologia Muzeo de la provinco Jiangsu havas tre valoran kaj riĉan kolekton de prahistorio ĝis nunaj tagoj. Kelkaj valoraj objektoj el tiu muzeo estis montritaj en 1974 al jugoslavia publiko.

De Nanjing al Ŝanhajo ni veturis per trajno en kvin horoj. Kia pureco en la vagono! Nur

en Svislando mi vidis similan ordon kaj nenie plu. Ŝanhajo estas ĉina havenurbo plej simila al eŭropaj urboj. Sed ĝia historia pasinteco gardas "ĉinan spiriton". En la domo (nun muzeo) kie estis fondita la Komunista Partio de Ĉinio, ni eksciis, de afabla mastrumanto, detalojn el historiaj momentoj.

En budaista preĝejo ni vidis sanktajn relikvojn kaj jadan statuon de Budao, kies valoro estas tre alta, kaj aliajn ornamaĵojn, kiujn posedas nur budais-taj monaĥejoj.

Por vidi kiamaniere amuziĝas ĉinoj, ni rigardis operon, pupteatron kaj variete-prezentadon. Ĉio estis bonkvalita kaj sperte prezentata, kaj ni kunportis belan memoraĵon pri ĉinaj artistoj kaj aktoroj. Ĉina popolo volonte rigardadas ĉiuspecajn prezentaĵojn. Ĉie mi vidis multe da polanoj, sed nenie estis svarmo aŭ granda bruo. Mi ne renkontis ebrian homon aŭ batalinterpuŝon. Ĉu vere ĉiam estas tiel en Ĉinio?

S-ino Cvetanka Tubiĉ (la dua de dekstre) kaj ĉinaj geesperantistoj en parko de Beijing



Dum tuta restado en Ĉinio, mi elektis nur ĉinan manĝaĵon kaj manĝis je ĉina maniero. Estis malfacile por mi je la komenco servi min per bastonetoj, sed poste mi lertiĝis. En grandaj magazenoj oni povas aĉeti bonajn varojn, kaj ankaŭ en hotelo ekzistas vendejo de diversaj memoraĵoj.

Nia gvidanto rakontis al ni detale pri la vivo en Ĉinio. Ni vizitis laboristan kolonion kaj unu familion. Kvankam modesta, la domo estis pura, kaj

ĉie regis ordo. Sed la plej interesa estis kontakto kun la infanoj en infanĝardeno. Ili kantis, ludis, dancis por ni kaj ilia prezentado estis admirinda. Ĉe la disiĝo, malgranduloj ankoraŭ longdaŭe mansvingadis al ni, kaj kriis en la ĉina lingvo: "Venu denove."

Kaj vere, post certa tempo, mi ŝatus reveni al Ĉinio, por denove ĝui ĉinan gastamon, kaj por admiri novajn atingajojn de Ĉinio.



* Jovic Vladislav, bestkuracisto, dez. kor. kaj interŝ. p.k. kaj p.m. kun gesamideanoj el diversaj landoj, Svetozara Markoviĉe 20, Yu 18000 Niš, Jugoslavio.

* Maria Coraiola, kun mezaĝaj aŭ maljunaj orientaj geesp-istoj, kiuj interesiĝas pri gemoj, floroj, historio, geografio, literaturo kaj ĝenerala kulturo, Tavernaro, 15, 38050 Terento, Italio.

* Janvso Tomczak, kun ĉinaj esp-istoj pri ĉina historio kaj kulturo, H. Savickiej 73/18, P. 65-559, Pollando.

* Barbavic Zana, 17-jara lernantino, kun esp-istoj el la tuta mondo, Ribarova 15, 58000 Split, Jugoslavio.

* Stanislav Tuma, kun esp-istoj de la tuta mondo, Ukrižku 7, CS-14000 Praha 4, Ĉeĥoslovakio.

* Krzysztof Mikulski, kun ĉinaj esp-istoj kaj el aliaj aziaj landoj, ul. Zelwerowicza 39, 80-516 Gdansk 7, Pollando.

* Lernantoj de Italio, kun ĉinaj gejunuloj, Studenti di Esperanto, Istituto A. Volta, Via Generale Chinotti, I, 33100 Udine, Italio.


* Peter Radig, kun geamikoj en Ĉinio, Filipinoj, Indonezio, Hongkong kaj Tajlando, Clara-Zetkin-Platz 21, 8028 Dresden, DDR.

* Krystyna Sitnik, 19-jara pollanda lernanto, kun knabo aŭ knabino en lernejo, ul. Krolowej Jadwigi 8 6/9, 63-400 Ostrow W/kp, Pollando.

* S-ino Kristos-Bonis Helene, kun ĉina esp-isto pri kulturo kaj popola vivo, kaj por persona amikeco, La Bovrg, Vollore-Ville, 63120-Covrpiere, Francio.

* S-ro Dao Pietro, 55-jara instruisto, kun geamikoj de la tuta mondo, Via trento 48, 380 17 Mezzolombardo, Italio.

* Johano Brenner, 35-jara, kun geesp-istoj en la tuta mondo pri turismo, b.k. kaj p.m. 4925 Sighetu-Marmatiei, Piata Libertatii Nro: 9, Jud Maramures, Rumanio.



Albert Einstein

—Ŝerco kaj serioze

Albert Einstein

En 1979, la tuta mondo celebris la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de Albert Einstein. Ankaŭ la esperantistoj havas sian motivon por dece marki tiun jubileon, kaj tion ja faris UEA per la plej gravaj paĝoj de sia organo Esperanto (marta n-ro, 1979). Antaŭ nelonge ni ricevis longan artikolon verkitan de prof. Toma Macovei (Rumanio) omaĝe al la scienca giganto kaj amiko de la Esperantomovado. Kvankam iom malfrua, ĝi certe interesos multajn el niaj legantoj, tial ni ĝin publikigas ĉi-sube post mallongigo.

— La Redakcio

Malfacile oni povas renkonti en la historio de la scienco ekziston pli dramatan ol tiu de Albert Einstein (1879 — 1955). El multaj vidpunktoj lia destino estis unika. Neniu realigis enpense tiom kuraĝajn kaj neatenditajn eksperimentojn, per kiuj li kreis la teorion de la relativeco (simpla kaj ĝeneraligita); sed, samtempe, neniu estis malpli komprenata, ĉar neniu alia teorio frapis pli ol ĝi la komunan senton kaj estis pli malfacile testebla.

Estas ne mirinde, ke tiel kontraŭdira personeco iĝis objekto de multaj anekdotoj, ŝercoj kaj spritaj rimarkoj. Ekzemple, Bertrand Russel, alia granda klerulo kaj filozofo de la jarcento, diris: “Ĉiu ajn scias, ke Einstein faris ion mirindegan, sed tre malmultaj scias ĝuste kion li faris.”

Signifoplena ĉi-rilate estas ankaŭ la sekvanta konversacio dum paŭzo de iu sciencista kongreso:

— Ĉu vi vidas tiun sinjoron en simplaj vestaĵoj kaj kun blanka, hirta hararo?

— Jes. Kion vi scias pri li?

— Tiu estas la sola homo, kiu komprenas la Einstein-an teorion.

— Ĉu jes? Kaj kiu estas li?

— Einstein mem!

Naskita ĉe Ulm, en Germanio, la 14-an de marto 1879, Einstein prezentis nenian genian signon dum la infanaĝo. Ĝis la tri-jara aĝo, li ne povis paroli. Ĉe gimnazio, poste; lia sendisciplina sinteno, kiu kaŭzis embarasojn al la profesoroj, faris tiujn prognozi, ke li neniam atingos ion en

la vivo. Pli malfrue, neniu el liaj obstinaj profesoroj rememoris pri li, ĉar li estis . . . mezvalora lernanto.

Einstein perdis la ekzamenon, kiam li deziris eniri la Federalan Instituton de Teknologio en Zurich, pro malaltaj notoj ricevitaj por zoologio, botaniko kaj aliaj lingvoj krom la germana. La rektoro de tiu instituto tiam diris al li: “Ĉu vi falis ĉe la ekzameno? Tio estas nenio. La samo okazis ankaŭ al Giuseppe Verdi, kiu ne sukcesis ĉe Konservatorio de Milano, kaj same al Charles Darwin, kiu estis eliminata pro ‘nekapableco’ el la Universitato de Edinburgo.”

Einstein ne malkuraĝiĝis kaj daŭre preparis sin sola en la direkto de siaj preferoj. Li publikigis en 1905 la verkon pro kiu li estis honorita en 1922 per

Nobel-premio. Ĝi estis donita al li pro la klarigo de la fotoelektra efiko, per kiu li evoluigis la ideon de la kvantumteorio de la radiado, kreita de Max Planck en 1900.

Depost sia dudeka jaro li okupiĝis daŭre pri du demandoj: 1. Kio okazus, se ni atingus la rapidon de lumradioj? 2. Kio okazus kun la naturleĝoj ĉe libere falanta lifto? La respondo de la unua kondukis lin al speciala teorio de la relativeco, kaj la respondo de la dua al la ĝenerala teorio de la relativeco.

La genieco de Einstein konsistis en tio, ke dum jaroj li obstine pensis pri tiaj problemoj, ĝis kiam li trovis kontentigan respondon. Einstein diris: "Talento estas afero de la karaktero. Dio distingis min per la persistemo de mulo kaj sufiĉe bona flarsento", aludante la fakton, ke li senĉese kaj obstine pripensis siajn problemojn. Tiu kapablo por koncentrado estas esenca karakterizaĵo de la pensmaniero de Einstein. La fakto, ke li estis en stato akiri tiel gravajn rezultojn laborante sola, neĉirkaŭita de scienca atmosfero, prezentas la duan karakterizaĵon de lia genieco.

Escepta kapableco uzi lertege la matematikan kalkulon, helpis multe la fizikiston en la ellaborado de la relativeca teorio. Iu konato petis lin telefoni al li pri iu afero.

— Sed mia numero estas tre komplika. Tial mi petas vin noti ĝin: 24.361.

— Kial komplika? — miris Einstein, — du dekduoj kaj kvadrato de 19.

Inter aliaj, Einstein admiris la filmojn kaj la heroojn kreitajn de Charles Chaplin, unu el la

plej grandaj aktoroj de la mondo. Dum Chaplin estis ankoraŭ je la komenco de sia kariero, Einstein skribis al li: "Tre plaĉas al mi via filmo 'Ĉaso de Oro'. Ĝi estas komprenebla por ĉiu kaj mi estas konvinkita, ke vi iĝos granda homo." Al li Chaplin respondis: "Mi admiras vin ankoraŭ pli. Via teorio pri la relativeco de neniuj estas komprenata kaj tamen vi fariĝis granda homo!"

Einstein havis ankaŭ sufiĉe multajn malamikojn, ĉar liaj novaj ideoj frapiĝis kontraŭ antaŭjuĝoj kaj ŝajnis kontraŭdiri la ĉiutagan sperton. La militistaj rondoj, poste, malamamis lin pro lia publika agado favore al socialismo kaj paco.

Sur publika kampo, Einstein rifuzis kandidatiĝi al la posteno de vicprezidanto de Usono. Interŝanĝe, kiam li aŭdis, ke la germanaj scienculoj sukcesis dividi la atomon, li studadis la problemon kaj skribis al prezidanto Roosevelt, alarmante lin pri la ebleco, ke la naziistoj povus realigi atoman bombon. Oni kredas, ke tiu letero konvinkis prezidanton Roosevelt decidi pri la projekto Manhatan, kiu produktis la unuajn atomajn armilojn.

Pli poste, kiam la atomaj bomboj eksplodis ĉe Hiroshima kaj Nagasaki, Einstein manifestis sian profundan bedaŭron. Post la milito li pardonpetis persone — kaj kun larmoj — al japana fizikisto Hideki Yukawa, kiu vizitis lin: "Se mi scius, ke la germanoj ne sukcesos konstrui atoman bombon, mi nenion farus por tiu bombo."


En la lastaj jaroj de sia vivo, Einstein estis kontraŭulo de McCarthyismo, kiun li konsideris "kongresa inkvizicio" kaj lia las-

ta publika ago estis apelacio kune kun Bertrand Russel kaj aliaj kleruloj por malaprobo de ĉiuj militaj agadoj.

Kiel patro de la relativeco, Einstein ŝanĝis la koncepton de la homo pri la universo kaj pri si mem, kaj li anoncis la atoman eraon. Sed la reputacio pri kiu li ĝuis en la tuta mondo, dank' al sia escepta kontribuo al scienca progreso, neniel falsigis al li la simplan humanecon. Al li konvenas perfekte la karakteriza komento, kiun li mem faris al Marie Curie, la malkovrinto de la radioaktiveco: "Ŝi estas la sola klerulo de mi konata, kies konduto ne estis influita de sukceso."

La centjara datreveno de lia naskiĝo okazigis apartajn manifestaciojn en Usono, en la F.R. Germanio, kiel ankaŭ en ceteraj landoj, per emisio de specialaj poŝtmarkoj, publikigo de novaj verkoj dediĉitaj al la klerulo, organizado de ekspozicioj, filmoj, specialaj radiodisaŭdigoj kaj televido ktp.

Antaŭ la Akademio de Sciencoj en Washington oni malkovris la statuon el bronzo de la fizikisto kvar metrojn altan. "Time" (Tempo) skribis ke 1979 estas "la jaro d-ro Einstein". Sed la plej adekvatan omaĝon, ŝajne, alportis al li la ĵurnalo "Washington Post (Vaŝingtona Poŝto)". Tiu publikigis desegnon simplan, sed de profunda signifo. La desegno prezentas angulon de la Universo, en kiu kelkaj planedoj estas surprizitaj en momento de ilia miljara evoluo. Kaj en tiu senlima vastego — unu sola signifo: sur planedo, kies nomon ni facile divenas, estas fiksita kutima bronza plato sur kiu oni skribis: "Albert Einstein vivis ĉi tie".



Ok Vidindejoj de Beijing

de YANG HONGXUN

LA montoj okcidente de Beijing kutime estas nomataj la Okcidentaj Montoj. Iliaj orientaj montpiedoj nefrapeblaj de la nordokcidenta vento el Mongolio estas dotitaj per favora klimato kaj abundas je fontoj kaj arboj, kaj estas fame konata pitoreskejo de antikveco. Ja veron montras la ĉina popola diro: "La famaj montoj estas plejparte okupitaj de bonzoj." Almenaŭ en Tang-dinastio (618-907 p. K.) tie jam konstruiĝis temploj. Ĉiuj Ok Vidindejoj estis origine sidejoj de budhaj temploj.

La Ok Vidindejoj situas en kvieta valo kun fontoj kaj groteskaj ŝtonoj, ombrata de arbaroj. Inter la ĉirkaŭaj montoj elstaras altuloj Cuiwei kaj Lushi, sur la antaŭa estas sep vidindejoj kaj sur la lasta unu.

CHANG'AN-TEMPLO DE MING-DINASTIO


Enirinte la verdan valon de la Ok Vidindejoj okcidente de la vilaĝo Sipingtai ĉe la montpiedo, oni unue vidas Chang'an-templon, kiu estas la unua el la Ok Vidindejoj. Oni diras ke tiu

templo kun bonorde dislokitaj konstruaĵoj kreiĝis en Ming-dinastio (1368-1644). Ĉe ĝi kreskas arbegoj grandaĝaj, raraj blankŝelaj pinoj (*Pinus bungeana*) kaj florarboj. En printempo la loko ĉarmas kiel bunta brokato. Sur ĝiaj montdeklivoj kreskas multaj persimonoj. En aŭtuna fino ili paradas per siaj brilaj fruktoj orflavaj.

LA BUDHO-DENTA PAGODO DE LINGGUANG-TEMPLO

Oriente de Chang'an-templo ĉe la piedo de Cuiwei-monto, inter la verdaj ombroriĉaj arboj staras Lingguang-templo konstruita en Tang-dinastio, t.e. la dua vidindejo. Ĝi estis templo tre majesta kaj en 1900 Jihetuan (boksista organizo) starigis tie varbejon. Poste la templo detruigis de kanonado de la Okpotenca Alianca Armeo kaj formalaperis ĝiaj konstruaĵoj, budhaj statuoj kaj porkultaj objektoj. En la templo restas la soklo de la Feoveniga Pagodo konstruita en Liao-dinastio (907-1125). Ĝi estas okangula kaj ĉirkaŭe ornamita per belaj brikaĵoj kaj ŝtonaj gravuraĵoj. En la domo sub la bazo antaŭe konserviĝis ŝtona kesto, en kiu estis skatolo el akilaria ligno (*Aquilaria agallocha*) kun unu dento de budho Ŝakjamunio ene. Sur la skatolo gravuriĝis sutro en sans-

La okcidenta korto de Lingguang-templo



Korto de la malnova turisma palaco de imperiestro



krito kaj la vortoj “Sarira dento de Ŝakjamunio”. Notoj en budhismaj klasikajoj diras, ke ĝi estas unu el la kvar postrestintaj dentoj de Ŝakjamunio kaj tre grava sanktaĵo por la budhistoj. En la fino de la kvindekaj jaroj, por fortigi unuigon kun diverslandaj popoloj kaj akceli la kulturan interŝanĝon kun ili, Ĉinio sendis laŭ peto la budhan denton al la budhismaj landoj Birmo kaj Srilankao por rondira eksponado al la popolanoj. En 1959 la ĉina registaro decidis konstruigi novan pagodon apud la soklo de la Feoveniga Pagodo de Liao-dinastio por konservi tiun denton. La nova pagodo estis projektita de la fama arkitekto Liang Sicheng. Ĝi estas 13-etaĝa kun alteco de pli ol 50 metroj konstruaj en Liao-dinastia stilo. Sur la blanka bazo staras helflava pagodo kun tegmento de verdaj glazuritaj tegoloj kaj ora pinaklo. Ĝi aspektas, inter la verdaj arboj sub la blua ĉielo, tre majesta kaj bela. La pagodo nun jam fariĝis ĉefa vidindaĵo en Lingguang-templo. La okcidenta korto de

la templo kun laĝeto el klara fontakvo abundas je natura gusto. Super la laĝeto staras laŭbo kaj ponto kaj naĝas en ĝi diversspecaj orfiŝoj. Estas vere plezure ilin rigardi tie!

LA ELEGANTA TEMPLO SANSHAN

Irinte supren je 500 metroj norde de Lingguang-templo, oni venas al la tria vidindejo — la templo Sanshan inter la montoj Cuiwei kaj Lushi. Por ĝia oportuna situo, multaj turistoj prenas ĝin kiel deirpunkton de sia vizito por grimpi supren ĝuante pejzaĝojn ĝis Chang'an-templo. Sanshan-templo estas serio da budhismaj konstruaĵoj en arbaro. Ĝi estis rekonstruita en la reg-periodo de imperiestro Qianlong (1736-1795) de Qing-dinastio. En la korto kreskas kvar grandaj olepinoj (*Pinus tabulaeformis*) kun aĝo de almenaŭ 500 jaroj. La orienta halo estas sen fasada muro kaj ekstere troviĝas perono de kie oni povas ĝui pejzaĝon de Cuiwei-monto.

PRAA GINKO KAJ ARHATAJ STATUOJ EN DABEI-TEMPLO

Forlasinte Sanshan-templon, oni povas veni laŭ zigzaga kvietaj vojo al la kvara vidindejo Dabei-templo. Tie la plej allogaj estas bambuegoj nomataj filostakoj (*Phyllostachys pubescens*), kiuj susuras en vento. Veninte al tiu loko oni sentas sin kvazaŭ en antikva templo de suda Ĉinio, ĉar ili estas tre raraj en Beijing. En la korto kreskas tre rigardinda giganta ginko kun aĝo de ĉ. 800 jaroj. Ambaŭflanke de la ĉefa halo staras 18 tre vivecaj arhataj statuoj. Ĉiu el ili havas propran karakterizaĵon. Oni diras, ke ili estis skulptitaj de la fama skulptisto Liu Yuan de Yuan-dinastio (1279-1368).

LA DRAKOFONTA TEMPLO

La kvina vidindejo la Drakofonta Templo staras pli supre. Ĉe la fonto oni konstruis la templon kaj donis al ĝi la saman nomon. La fontakvo fluas el la buŝo de ŝtona drako antaŭ la

ŝtuparo de la halo en laĝeton. Ĉar la akvo estas iom varma, akvolilioj en ĝi eĉ povas travintri.

XIANGJIE-TEMPLO — LA MALNOVA "TURISMA PALACO DE IMPERiestRO"

La sesa vidindejo Xiangjie-templo situas pli supre ol la Drakofonta Templo. Ĝi konstruiĝis en Tang-dinastio kaj estis turisma palaco de imperiestroj de Qing-dinastio (1644-1911). Laŭ la antikveco kaj grandiozeco ĝi estas la unua el la Ok Vidindejoj. Meze de la templo estas budha halo kaj en la plej malantaŭa korto troviĝas sutrokonservejo kun akcesora konstruaĵo. En la korto kulturiĝas magnolioj, peonioj kaj aliaj raraj floroj, kreskas ankaŭ pomarboj, piroarboj, persikarboj kaj maluso (*Malus spectabilis*) k.a. Krome, oni tie aranĝis artisme groteskajn rokojn, akvejon kun ponteto kaj aliajn ĝardenajn aranĝaĵojn kun ĉina stilo. La porvojaĝa dormodomo

troviĝas en la maldekstra korto kaj en la dekstra korto legoĉambro, de kie oni povas rigardi la tutan Bejing.

PERLO-KAVERNO SUR LA PINTO DE CUIWEI


Se oni iras supren de Xiangjie-templo, oni povas rekte atingi la montpinton Cuiwei. Iom sub la montpinto troviĝas arka pordo, post kiu estas la sepa vidindejo Perlo-kaverno, kiu estas la plej alta el la Ok Vidindejoj. Ekster la kaverno estas konstruaĵo kun du kortoj — suda kaj norda. Post la okcidenta domo troviĝas granda kaverno, ĉe kies enirejo ĉiuj rokoj similas al perloj, pro kio, oni diras, ĝi ricevis la nomon. Sed aliaj asertas, ke antaŭe tie loĝis iu bonzo nomata Perlo, post kies morto oni metis lian orumitan statuon en sida pozo en la kavernon, kaj pro tio ĝi ricevis la nomon. Apud la kaverno estas Kiosko por Malproksimen-rigardo, de kie oni povas klare vidi en serena tago la Blankan Pagodon

kaj aliajn konstruaĵojn en Bejing.

DEMONSUBIGA ROKO SUR LUSHI-MONTO

Post rigardo de la sep vidindejoj kaj malsupreniro, oni povas laŭvoje surgrimpi alian monton Lushi kaj veni al la lasta vidindejo Zhengguo-templo. Ĝi famiĝis pro la Demonsubiga Roko nordokcidente de la templo. Tiu rokego etendiĝanta en aeron tre similas al tegmento, sub kiu oni elhakis ŝtonan ĉambron. Legendo diras, ke en Tang-dinastio iu bonzo nomata Lushi tie subigis demonon. Tial la monto ricevis la nomon Lushi kaj la ŝtona ĉambro estis titolita Demonsubiga Roko. De tie oni povas ĝui la pejzaĝon de la tuta Cuiwei-monto trans ravino.

En la lastaj jaroj, kun la disvolviĝo de turisma afero, la urbokonstruaj kaj ĝardenaj administracioj de Bejing nun estas projektantaj riparadon kaj konstruadon de pitoreskejoj. La Ok Vidindejoj post riparado kaj ordigo certe fariĝos pli allogaj.



* S-ino Ursula Zilvar, 26-jara, kun junaj patrinoj el Ĉinio, Japanio kaj Koreio en Esp., Grubenhagenstr. 8, D-3420 Herzberg, FR. Germanio.

* S-ro Hartmut Brodhuhn, 22-jara, kun junaj ĉinoj pri ĉiuj temoj en Esp., Tannenbergr. 4, D-3423 Bad Sachsa, FR. Germanio.

* S-ro Jurgen Kreter, 19-jara, kun Ĉinaj esp-istoj kaj aliaj landaj pri ĉiuj temoj, Heidelgasse 2, D-3420 Herzberg-4, FR. Germanio.

* S-ro Chris Brandes, 26-jara medicinstudento, kun junaj geesp-

istoj el Ĉinio, Orientazio kaj aliaj landoj pri orientazia popolmedicino, Esperanto kaj aliaj temoj, Petrikirchstrato 12, (Wohnung/loĝejo 42 A), D-3400 Gottingen, FR. Germanio.

* Janina kaj Andrzej Malaszowski, geedzoj biologistaj, pri ĉiuj temoj, 58-309 Walbrzych, str. Hirszfelda 4 m. 13, Pollando.

* Joanna Malaszowska, 8-jara knabino, kun junaj geesp-istoj kaj interŝ. p.m. kaj b.k., 58-309 Walbrzych, str. Hirszfelda 4. m. 13, Pollando.


* Koritnik Jenja, 12-jara, kun geesp-istoj 10-15 jaraj pri kolekto de b.k. kaj signoj, Varŝkovo 2, 61230 Domzale, Jugoslavio.

* Anoj de Esperanta sekcio, kun samideanoj de la tuta mondo, adreso: la instruisto: Ilija Popouski, Hast, Osn. Učil "Kiril i Metodij", 97000-Bitola, Jugoslavio. Sube: foto de la superdirita Esp. sekcio.



Pejzaĝoj de Beijing


Biyun-templo





Aütuna pejzažo de Xiangshan-parko





La Budho-denta Pagodo

LA 65-A UK DE ESPERANTO EN SVEDIO

En la 2a-9a de aŭg., la nomita kongreso okazis en Stokholmo, Svedio. En ĝi partoprenis pli ol 1,800 esperantistoj el 51 landoj. Dum la kongreso oni faris vastan diskutadon pri la ĉefaj temoj: diskriminacio rasa-etna, kontraŭvirina, internacia ekonomia, lingva kaj alia.

La Ĉina Esperanto-Delegacio estrata de verkisto Bakin ĉeestis la kongreson. Je la 2-a s-ro Bakin donis salutvortojn al la kongreso kaj ricevis varman aplaŭdadon. Zeng Heyao, membro de la ĉina delegacio, faris paroladon sub la titolo "Senĉese Batalu por Forigi Diskriminacion" kaj Ye Junjian prelegis pri la temo "La Karakterizo de la Ĉina Moderna Literaturo" en la Internacia Somera Universitato.

LA ĈINA E-DELEGACIO EN LA 2-A PKE

La Ĉina Esperanto-Delegacio estrata de profesoro Xue Chengzhi partoprenis en la 2-a Pacifika Kongreso de Esperanto, kiu prenis la lokon en la marborda urbo Vankuvero, Kanado, en la 27a-29a de julio. Ĝin ĉeestis 170 esperantistoj el Kanado, Usono, Meksikio, Nov-Zelando, Aŭstralio, FR Germanio, Hungario, Britio kaj aliaj 5 landoj. En la kongreso la ĉinaj esperantistoj faris vastan kontakton kun siaj kolegoj de aliaj landoj. La postkongresa ekskurso je 2,000 km. havigis al parto de la partoprenantoj ŝancon sate ĝui pitoreskan pejzaĝon de Kanado.



Seminarianoj de TEJO antaŭ la Domego de Eŭropa Parlamento

36-A KONGRESO KAJ SEMINARIO DE TEJO

De la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭg. okazis la 36-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Raŭmo, Finnlando. Ĉeestis ĝin 332 reprezentantoj el 29 landoj. La ĉefa temo de la kongreso estis "Popola tradicio en la nuntempa mondo". La programon kompletigis esperantologiaj diskutoj kaj internacia vespero.

TEJO okazigis ankaŭ seminarion kun la temo "Internacia komunikado — aplikado de Esperanto", kiu daŭris unu semajnon ekde la 15-a de junio. Farita estis interesa prelego pri instru-metodoj de Esperanto.

JAPANA-ESP-A VORTARO PRESPRETA

Jam delonge, eminenta japana esp-isto Mijamoto M. kompilas vortaron Japanan-Esp-an. Tiu ĉi vortaro, kiu estas longe atendata, estas eĉ pli ampleksa ol PIV, kun pli ol 60 mil kapvortoj.

FONDAĴO GUNTHER BECKER

Okaze de la 50-jara datreveno de la naskiĝo de sia longjara prezidanto Sarlanda Esperanto-Ligo decidis malfermi Fondajon Gunther Becker. Ekskluziva celo de la fondaĵo estas stimuli la eldonon de germanlingva scienca literaturo pri

esperantologio kaj interlingvistiko. Per tio fermiĝu grava informa breĉo kaj ebligu celtaŭga varbado por Esp. inter lingvistoj, literaturistoj, lingvo-instruistoj, politikistoj, ktp.

SEL sin turnas al ĉiuj amikoj de la internacia lingvo kaj al ĉiuj Esp. organizadoj kun la peto helpi en la realigo de la projekto per unufoja financa subteno, per regula subtenado aŭ per antaŭmendo de la germana versio de "Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto" de J. C. Wells.

INTERVIDIĜO KUN IRLANDA KNABO-ESPERANTISTO

13-jara esperantisto Marc Campbell, filo de la irlanda ambasadoro

Irlanda esperantisteto Marc Campbell (la dua de maldekstre) kaj liaj Esperantaj kunlernantoj



en Ĉinio, venis al Beijing en julio por pasigi la somerajn feriojn. Du laborantinoj de la redakcio de El Popola Ĉinio vizitis lin kaj donacis al li ĉinajn poŝtmarkojn kaj Espeldonaĵojn, kiujn li tre ŝatas.

ESP. MOVADO EN IRLANDO

La Esperanto-Asocio de Irlando (9 Templeogue Wood, Dublin 12) kongresos de la 24-a ĝis la 27-a de oktobro. Tio estos ĝia unua kongreso. Oni planas libro-ekspozicion kaj intensan kurson por komencantoj. Prelegos la sciencfikcia aŭtoro Harry Harrison, membro de EAI. La Asocio vigligis ankaŭ la eldonadon de sia kvaronjara informilo.

FONDIĜIS LA BENGBU-A ESPERANTO-LIGO

Je la 15-a de julio okazis en la Scienca Domo de la urbo la kongreso por fondi la nomitan ligon. En ĝi partoprenis pli ol 130 personoj. La kongreso ricevis gratulajn leterojn kaj telegramojn de la Ĉina Esperanto-Ligo, la Sociologia Federacio de Anhui-provinco, scienc-teknikaj asocioj kaj Esperanto-organizaĵoj de diversaj lokoj. Elektita estis la 7-persona konsilantaro de la ligo. Ĝia prezidanto estas Yu Zixun, vicestro de la urba propaganda departemento de KPĈ, kaj la

vicprezidantoj estas Zhang Weimei, Zhu Shiquan kaj Yu Guojian.


HEBEI-A ESPERANTO-LIGO EN PREPARADO

Antaŭ nelonge stariĝis la prepara grupo de la Hebei-a Esp-Ligo en Shijiazhuang, la ĉefurbo de Hebei-provinco. La grupestro estas Chen Shengxiang, vicprofesoro de la ĉinlingva fakultato de la Hebei-a Normala Universitato, kaj la vicestroj estas Shi Yongning kaj Xu Tiesheng. Ili baldaŭ funkciigos Esp-kurson.

NOVAJ PERIODAĴOJ "PRINTEMPO" KAJ "MAROTO"

En junio ekaperis "Printempo", la mimeografita bulteno de la Chongqing-a Esperanto-Ligo. En ĝia unua numero publikigis la artikolo "Johano Vojaĝas en Chongqing", materialo por Esperanta konversacio, kaj en ĝia dua numero la novaĵo pri aktivado de "Somera Semajno de Esperantistoj" okazigita de la urbo.

En la 15-a de julio eldoniĝis, en la urbo Huainan, Anhui-provinco, la periodaĵo "Maroto" en deksefolia formato. Ĝi servas kiel ĝardeno de esperantaj amatoroj kaj komencantoj, kun la celo propagandi kaj popularigi Esp. En ĝia



La Huaguoyuan-a Esperanta Kurso de Guiyang

unua numero aperis artikoloj pri Esperanto kaj ĝia gramatiko, kaj rememoro pri Verda Majo.

PROSPERAS ESP-KURSOJ

Depost majo ĉi-jare, novaj Esp-kursoj kun pli ol 400 lernantoj estis starigitaj en grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio. En la Junulara Domo de Chengdu oni aranĝis du kursojn. La fizikkulturaj kaj sportaj komisionoj de Sichuan-provinco kaj Chengdu respektive funkciigis kurson. Por kulturaj Esperantaj instruistoj, la Scienca kaj Teknologia Asocio de Huainan kaj la Eduka Buroo de tiu urbo kune aranĝis mallongperiodan Esp-kurson. La studrondo de Huaguoyuan, Guiyang, Guizhou-provinco, establis mezgradan Esp-kurson.



La fondiĝa kunveno de Esperanto-Ligo de la urbo Bengbu



REFORMADO DE SAL-ALKALA TERO

de JILAN

Tritiko bone kreskas sur la sal-alkala tero reformita.

REFORMADO de sal-alkala tero estas grava temo por agrikultura scienca esplorado ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en iuj aliaj landoj. Ĉirkaŭ la vilaĝo Zhangzhuang en la sudo de Hebei-provinco de Ĉinio, unuapasa atingo jam estas gajnita en la reformado de sal-alkala tero. La antaŭa sal-alkala loko nun jam fariĝis riĉrikoltaj kampoj kun densaj forstozonoj. Ĉijare, en la rikolta sezono de tritiko, mi vizitis la lokon kaj informiĝis pri multaj kortuŝaj aferoj en reformado de sal-alkala tero.

LA DEZIRO DE LA POPOLANOJ EN SAL-ALKALA REGIONO

Kiam mi atingis la vilaĝon Zhangzhuang, Zhao Wen, gvidanto de la produkta brigado, unue kondukis min al kampoj. La rektaj vojoj, la densaj kampoprotektaj forstozonoj kaj interkruciĝantaj irigaciaj kanaloj dividas la vastan ebenan teron en bonordajn parcelojn. Rigardante la dikajn tritik-stoplojn post la ĵusa rikolto kaj bone kreskantajn maizplantojn sur

kampoj, mi nedeteneble demandis: "Ĉu tie estis sal-alkala tero pasintece?"

"Jes, alilokanoj ofte faris tian demandon. Tamen, nun ĝi jam ŝanĝiĝis post la sinteza reformado. Rigardu, tie restas antaŭa sal-alkala terpeco!" diris maljuna Zhao fingre montrante nordorienten. Fore de ĉirkaŭ duona kilometro, videblas ses montetsimilaj teramasoj. Li diris, ke pasintece, ĉirkaŭ Zhangzhuang ĉie estis tiaj teramasoj kaj kreskis nur kelkaj malgrandaj arboj. En somero oni eĉ ne povis trovi ombron por ripozo.

En la malnova Ĉinio, la sal-alkala tero de Zhangzhuang estis nekultivebla. Vintre kaj printempe oni sin vivtenis per salfarado kaj somere kaj aŭtune per sindungigado aliloke. Jaron sekvis jaro kaj ĉirkaŭe de la vilaĝo ĉie estis teramasoj formiĝintaj en salfarado. Nur en iuj malaltaĵoj oni faris kultivadon, sed la rikolto estis tre malalta. En jaro de trosekeco aŭ inundo, la vivo fariĝis pli mizera. En la jaro 1943, okazis unue trosekeco kaj poste inundo. 104 el la vilaĝanoj

mortis de malsato, 46 estis venditaj kaj 323 forfuĝis.

Post la Liberiĝo, la kamparanoj de Zhangzhuang emancipiĝis. Kvankam ili iris sur la socialisman kolektivon, tamen pro la serioza sal-alkaliĝo de la tero, la produktita greno ne povis kontentigi ilian vivbezonojn. Poste, la partia filio de la produkta brigado decidis gvidi la komunumanojn por forigi la malriĉecon kaŭzitan de la sal-alkaliĝo. Ili fondis kamparanan vesper-lernejon por altigi kulturan kaj teknikan scion de komunumanoj kaj samtempe movis ilin prezenti rimedojn kaj proponojn por elimini sal-alkalon.

Ekde tiam, la brigado ofte sendis personojn aliloken por lerni bonajn spertojn pri reformado de sal-alkala tero. Vintre kaj printempe, ili formovis alkalon teron aŭ fosis kanaletojn, konstruis kvadrat-kampojn kun alta rando, teras-kampojn kaj oblong-kampojn. Oni ne sciis, kiom da energio ili uzis en tiu laboro, tamen, la sal-alkalo restis ankoraŭ nevenkebla. Somere de 1973, pluvis plurajn tagojn



La antaŭa sal-alkala tero

kaj Zhangzhuang fariĝis kiel maro. Post unu monato, la stagna akvo en la kampoj estis ankoraŭ profunda je triono da metro. Rigardante la dronantajn plantaĵojn en la akvo, oni demandis pretervole: Ĉu vere nevenkebla estas la sal-alkala tero?

SUKCESOJ EN SINTEZA REFORMADO

Kiam la Zhangzhuang-vilaĝanoj maltrankviliĝis pro akvo-stagno en kampoj, Shi Yuanchun kaj aliaj kvar instruistoj de la Beijing-a Agronomia Instituto venis al ilia gubernio Quzhou kun scienc-esplora tasko sinteze reformi tian sal-alkalan teron.

La norda parto de Quzhou-gubernio estis alkala regiono fama en la historio. La instruistoj de la Agronomia Instituto vizitis multajn produktajn brigadojn en du monatoj kaj faris kunsidon kun iliaj kadroj kaj komunumanoj. Ili faris esploron kaj detalan enketadon pri ĉelokaj topografia trajto, hidrologio, geologio, klimato kaj grundo kaj decidis starigi scienc-esploran bazon en Zhangzhuang, kiu estis serioze plagita de alkaliĝo.

En la kunveno por elimini alkalon, okazigita de la gubernia

partia komitato, la instruistoj de la Agronomia Instituto klarigis la kaŭzon de formiĝo de sal-alkala tero kaj prezentis siajn opiniojn pri ĝia reformado. En Quzhou-gubernio, precipitaĵo en somero estas preskaŭ du trionoj de tiu de la tuta jaro pro influo de la sudorienta musono el la maro; vintre kaj printempe, la vaporiĝ-kvanto superis okoble la precipitaĵon pro la seka nord-okcidenta vento el la interna kontinento, tial la sezonoj seka kaj pluva estas rimarkindaj. Krome, la sal-alkala regiono estas ebena kaj sin trovas inter la riveroj Fuyang kaj Zhizhang. Zhangzhuang estas en la centro de la malaltaĵo, kaj la nivelo de tiea subtera sala akvo estas alta. Dum la seka sezono, la subtera salakvo grandkvante vaporiĝas tra la supra grundo kaj la salo restas en la grundo; dum la pluva sezono, la stagna akvo estas malfacile drenebla kaj la salo en grundo solviĝas en la akvo, tiel ke la salo en la supra grundo kaj en la subtera akvo pli kaj pli multiĝas pro alterna okazo de trosekeco kaj inundo.

Ili opiniis, ke por elimini sal-alkalon, oni devas superregi la movadon de akvo kaj salo kaj praktiki sintezan reordigon al

trosekeco, inundo, alkalo kaj salo. Ili proponis konstrui profundajn kanalojn kaj malprofundajn putojn kaj samtempe fosi dolĉakvajn profundajn putojn kaj kanalojn. Tiamaniere, en la pluva sezono oni povos dreni alkalan akvon tra la profundaj kanaloj kondukantaj al Zhizhang-rivero kaj ĉerpi salakvon el la malprofundaj putoj kaj aldoni dolĉan akvon; en la seka sezono, oni povos enkonduki akvon el la rivero tra profundaj kanaloj por mildigi trosekecon kaj mallevi alkalon, kaj malaltigi la salakvon je kvar metroj per la malprofundaj putoj por evakui subteran lokon por enteni dolĉan akvon dum pluva sezono. Oni ankaŭ povos irigacii kampojn kaj mallevi alkalon dum trosekeco per dolĉa akvo el la profundaj putoj. Unuvorte, per tiuj rimedoj oni povos paŝo-post-paŝe redukti la salo-entenan proporcion en la surfaca grundo kaj tiun en la subtera akvo kaj turni la sal-alkalan teron en fekundajn kampojn.

La partia komitato de la gubernio konsentis iliajn analizojn kaj proponojn, starigis gvidan grupon por elimini alkalon kaj difinis 400 hektarojn da alkalkampoj de la du produktaj brigadoj Zhangzhuang kaj Dajie kiel eksperimentan regionon. La instruistoj de la Agronomia Instituto respondecis pri la projektado de inĝenierajoj kaj teknika gvido, kaj la gubernia komitato pri la konstruado.

Vintro de 1973 estis frostega, sed la popolanoj de Quzhou-gubernio estis entuziasmaj. Malgraŭ frosta vento, ili iris al laboro frumatene kaj revenis malfrue. Por drenado dum pluva sezono, ili fosis en la nordo de la alkala regiono sep grandajn profundajn kanalojn kun totala

longeco de 23 kilometroj. En 1974, ili ebenigis teron, fosis kanalojn kaj putojn kaj per tio konstruis eksperimentan kampon kun areo de 26 hektaroj sude de Zhangzhuang-vilaĝo. Rezulte de tio, sur tiu antaŭa alkala tero, kie neniam kreskis vegetaĵoj, la hektara grena produktokvanto de unu rikolto superis 2,250 kilogramojn.

La rimarkinda sukceso en la eksperimentado multe inspiris la popolanojn en eliminado de alkalo. Laŭ projekto, en ĉiu kultura unuo kun 8 hektaroj da kampoj oni boris puton profundan je 40 metroj kaj en ĉiu kultura unuo kun 47 hektaroj da kampoj puton profundan je 300 metroj. Tiamaniere, en la tuta eksperimenta regiono estis konstruita dren-irigacia sistemo el putoj interligantaj unu kun alia per kanaloj.

Post kvarjara sinteza reformado, la areo de sal-alkala tero en la eksperimenta regiono malgrandiĝis de 83% ĝis 20%, kaj la salo-entena proporcio en la akvo de malprofundaj putoj reduktiĝis de 0.7% ĝis 0.5%. Post kiam falis pluvo kun precipitaĵo de 350 milimetroj en tri tagoj, ne okazis inundo, kaj dum centtaga senpluvado ne okazis trosekeco. Dank' al tio, jaro-post-jare pliboniĝis la agrikultura produktado en la eksperimenta regiono. En 1978, la meznombra hektara produktokvanto de greno leviĝis de 1,500 kilogramoj antaŭ la reformado al 4,950 kilogramoj. La hektara grena produktokvanto de Zhangzhuang unuafoje superis 7,500 kilogramojn, la greno vendita de ĝi al la ŝtato superis ĝian totalan produktokvanton de greno antaŭ la reformado. La komunumanoj ĝoje diris: Nia Zhangzhuang ĝisfunde ŝanĝiĝis!

ANTAŬENMARŜO EN LA REFORMADO

Antaŭ la venko la gvidantoj kaj amasoj de Quzhou-gubernio ne ĉesigis siajn paŝojn. Kiam la tutlanda popolo klopodas por realigi la kvar modernigojn, ili komencis reformadon al la tuta norda alkala regiono de la gubernio. Ili starigis teknikan grupon el 40 personoj, kaj tiu faris prospektoradon al 15,300 hektaroj da sal-alkala tero kaj ellaboris projekton pri konstruado. Direktate de la teknikaj laborantoj, la komunumoj kaj brigadoj en la tuta sal-alkala regiono komencis la batalon por elimini sal-alkalon.

Iutage, veturante norden de la gubernia urbo, ni vidis nur ebenajn kvadratajn kampojn ambaŭflanke de la ŝoseo kaj trovis neniom da sal-alkala tero. La gubernia kadro kamarado Zhang diris al mi, ke dek grandaj profundaj kanaloj kun totala longeco de 100 kilometroj jam estas

fositaj, 50% de aliaj kanaloj kaj malprofundaj putoj kaj 38% de profundaj putoj jam estas plenumitaj kaj multaj kampoj jam estas ebenigitaj.

En kabineto de la scienc-esplora bazo de la Agronomia Instituto mi intervjuis vicprofesoron Xin Dehui. Li estas unu el la kvin instruistoj, kiuj tien venis en 1973. Li emocie diris al mi: "La Ŝtata Agrikultura Komisiono donis grandan atenton al nia scienc-esplora laboro. Pasintjare ĝi disponigis 5 milionojn da juanoj por plifortigi la esploradon, ankaŭ la Ministerio de Agrikulturo asignis 500,000 juanojn por plivastigi nian bazon en esploran stacion. Nun la domo de la stacio jam finkonstruiĝis kaj la aliaj akcesoraj konstruaĵoj estas en streĉa konstruado."


Mi gratulis ilin pro la atingoj gajnitaj en la batalo kontraŭ sal-alkala tero. Vicprofesoro Xin modeste diris: "Kvankam ni atingis certan sukceson en la

Ekperimentado sur artefarita sal-alkala tero



sinteza reformado, tamen ni ankoraŭ devas solvi multajn problemojn, kiaj konado de la movado-leĝo de akvo kaj salo, la reformado kaj regado de ekologia sistemo de salecaj kampoj, teleregado kaj observado de amasoj da putoj. La Ŝtata Scienca kaj Teknika Komisiono jam prenis nian esploron kiel gravan scienc-esploran objekton de la ŝtato.”

Vicprofesoro Xin diris al mi, ke tre peza estas la tasko por reformado de sal-alkala tero, ĉar en la malsupra baseno de Huangherivero (Flava Rivero) kaj la basenoj de Huaihe-rivero kaj Haihe-rivero troviĝas ĉ. 3 milionoj da hektaroj da sal-alkala tero, se oni reformos ilin en fekundajn kampojn, tio signifos, ke oni pliprodukto por la ŝtato 5 miliardojn da kilogramoj da greno kaj grandan kvanton da kotono, oleo kaj brutaj produktaĵoj. Tial la ŝtato, laŭ la malsamaj specoj de la sal-alkala tero, starigis ses eksperimentajn regionojn kaj ĝustatempe disvastigas iliajn atingojn. Nun ĝojinda progreso jam estis gajnita en la reformado de sal-alkala tero en iuj regionoj.



Nanjing

—antikva kaj juna urbo

de XIAO XUESHENG

Post kiam la du fame konataj antikvaj kulturaj urboj Nanjing kaj Florenco fariĝis fratinaj urboj en februaro de la kuranta jaro, nia leganto Edo Taddei el Florenco skribis al ni, esperante pli bone koni la urbon Nanjing. Pro tio ni sendis ĵurnaliston al Nanjing por pretigi tiun raporton. Krome, Nanjing amikiĝis sinsekve kun Nagojo de Japanio kaj St. Louis de Usono. Niaj legantoj en tiuj du urboj probable ankaŭ interesiĝas pri jena raporto.

— La Red.

La urbo Nanjing kun 1,900,000 loĝantoj situas en la sudorienta parto de Ĉinio kaj apud la malsupra baseno de Changjiang (Jangzi)-rivero. Ĝi limtuŝas norde kun la vasta Huainan-ebenaĵo kaj sudoriente kun la fekunda Changjiang-rivera delto. Ĉirkaŭ la urbo staras ondantaj montaroj kaj la torenta rivero fluas preter ĝi. Kun la montoj kaj rivero ĝi aspektas pli majesta. Ekde la tria jarcento p.K. ok feŭdaj dinastioj (Orienta Wu-regno, Orienta Jin-, Song-, Qi-, Liang-, Chen-, Suda Tang- kaj Ming-dinastioj) prenis ĝin kiel sian ĉefurbon unu post alia. Nanjing, Beijing, Xi'an kaj Luoyang kune estas nomataj kvar antikvaj kulturaj ĉefurboj de Ĉinio.

Ĉi-somere, mi speciale vizitis la urbon Nanjing. Ne longe post kiam mi eliris el ĝia fervoja stacio, mi jam vidis la majestan urbomuron, simbolon de la antikva ĉefurbo, konstruitan de Ming-dinastio en la 14-a jarcento.

La Ming-dinastia urbomuro estas duobla. La ekstera longas je 90 km. kun 18 pordegoj kaj formiĝis el tero. Kaj la interna longas je 33.5 km. kun 13 pordegoj kaj masoniĝis el grandaj kaj oblongaj ŝtonpecoj

kaj speciale faritaj urbobrikoj, ĝi altas je 19-21 metroj, la supra surfaco larĝas je 4.9 metroj kaj la bazo je 14.5 metroj. La grandeco de ĝia skalo kaj majesteco de ĝia aspekto estas la unuagradaĵo ne nur el la multaj antikvaj urboj de Ĉinio sed ankaŭ malofte viditaj en la mondo. Por konstruigi tiun urbomuron, la unua imperiestro de Ming-dinastio Zhu Yuanzhang rekviziciis 200,000 laborulojn kaj foruzis 21 jarojn. Dum tiu tempo Zhu Yuanzhang konstruigis ankoraŭ majestan kaj pompan palacon interne de la urbo. Tamen en la sekvanta jaro post lia morto (1399 p.K.) lia kvara filo Zhu Di ribelis por kapti la regpotencon. Post 4-jara militado, la armeo de Zhu Di sturmis Nanjing kaj la palaco destruiĝis de incendio. Post la surtroniĝo Zhu Di prenis Beijing kiel ĉefurbon en 1403. Pro multaj historiaj ŝanĝiĝoj kaj militoj, la Ming-dinastia palaco en Nanjing lasis tre malmultajn restaĵojn.

Mi rigardis la centran sudan pordegon de la interna urbo (la nuna pordego Chonghua). Tiu antikva pordego-fortreso longas je 128 metroj de la sudo ĝis la nordo kaj larĝas je 118.5 metroj kun totala

areo de 15,168 kvadrataj metroj. Ĝi konsistas el kvar arkformaj pordoj kaj tri fuortoj, la antaŭa, malantaŭa, supra kaj malsupra partoj estas interkondukeblaj kaj formis kompletan tuton. La originale konstruitaj domoj sur la malantaŭaj tri arkformaj pordoj nun jam ne ekzistas. La gvatturo sur la unua pordo estis trietaĝa, la supra etaĝo detruigis de milita fajro, la meza etaĝo estas konstruita el brikoj kaj ŝtonpecoj, sur ĝia norda flanko viciĝas sep altaj kaj profundaj kaverno por kaŝi so'datojn. Ĉirkaŭ la pordego Chonghua troviĝas sume 27 tiaj kavernoj, kiuj povas enteni 3,000 soldatojn kaj esti uzataj por stapli armilojn kaj grenon. Tiu lerte projektita, granda fortreso estas gravega objekto por esplori la antikvajn militajn konstruaĵojn de Ĉinio.


Fakte, la Ming-dinastia urbomuro ne estas la plej frua urbomuro de Nanjing. Jam en la 5-a jarcento a. K. Wu-regno tie konstruigis urbeton por fari armilojn. En 333 a. K. Chu-regno konstruigis tie urbon Jinling sur ŝtona monto (la nuna monto Qingliang okcidente de Nanjing), kiun oni nomis "Ŝtona Urbo". Nun oni ankoraŭ povas vidi la rompitan muron postlasitan ĉe la flanko de la monto. En la pasintaj pli ol dumil jaroj "Ŝtona Urbo" eĉ fariĝis alia nomo de Nanjing.

Ĝis la Liberiĝo en 1949, la urbo Nanjing, fame konata en la historio, tamen fariĝis tipa urbo de konsumantoj. La Kuomintanga registaro prenis ĝin kiel sian ĉefurbon en 22 jaroj, ĝis la Liberiĝo la loĝantaro nombriĝis je pli ol 700,000, inter kiuj tamen troviĝis proksimume 200,000 senlaboruloj. Nur 36 fabrikoj uzis elektron kaj la nombro de la industriaj laboristoj atingis malpli ol 10,000. Tamen la prostituitinoj, kantovendistinoj kaj dancoakompanistinoj en la urbo atingis la nombron de 24,000, kiuj plejparte koncentriĝis ĉirkaŭ la Konfucea Templo, kiu estis uzata por


kulti Konfuceon en la pasinteco kaj situas ĉe Qinhuai-rivero en sudorienta urbo. Post disvolviĝo dum pluraj jarcentoj, ĉirkaŭ ĝi formiĝis prospera kvartalo, en kiu koncentriĝis centoj da drinkejoj, restoracioj, teatroj kaj dancejoj, tial la kvartalo estis loko kie amasiĝis opi-fumantoj, vetludantoj, prostituitinoj kaj kanajloj. Nun ĉio ĉi tio jam fariĝis pasintaĵoj. Sekvante moviĝantaj homamasojn, mi promenis ĉirkaŭ la templo, ĉie en tiu kvartalo staras butikoj kaj vendejoj, estas tre movplene kaj bonorde. Videbliĝis nenia spuro de la pasintaj bordeloj, opifumejoj kaj vetludejoj. La pligrandigita Konfucea Templo jam fariĝis kultura domo de Qinhuai-kvartalo kaj popola amuzejo. Kamarado de la Qinhuai-distrikta partia komitato diris al mi, ke ĉirkaŭ la Konfucea Templo nun troviĝas 21 fabrikoj funkciigitaj de la urba, distrikta kaj kvartala organizoj. La pasintaj prostituitinoj devigitaj de malriĉeco jam delonge fariĝis veraj laborulinoj kaj fondis siajn feliĉajn familiojn.

La nuna Nanjing jam fariĝis industria urbo en certa skalo. Ĝi estas ankaŭ la centro de politiko, ekonomio kaj kulturo de Jiangsu-provinco.

Mi vizitis la Nanjing-an Kemiindustrian Kompanion ĉe la norda bordo de Changjiang-rivero. Antaŭe ĝi estis la Yongli-a Amoniaka Fabriko kaj ĝuis reputacion en la tuta lando. Eĉ en sia plej prospera tempo ĝi havis nur 2,000 oficistojn kaj laboristojn kaj la ĉiujara produktokvanto de kemisterko estis nur 20,000 tunoj. Nun, kun 130 kemiindustriaj entreprenoj Nanjing fariĝis unu el la gravaj kemiindustriaj bazoj de nia lando. Ankaŭ la Yongli-a Amoniaka Fabriko disvolviĝis en modernan sintezan kemiindustrian entreprenon. Ĝi konsistas el 13 unuoj, inkluzive projektadon, esploradon, bazokonstruadon kaj produktadon, kun 24,000 oficistoj kaj laboristoj. Ĉiujare tiu entrepreno produktas milionon da tunoj




La Monumento de la Revoluciaj Martiroj en Yuhuatai



La Nanjing-a Petrolo-rafina Fabriko

da kemisterko kaj aliajn kemiaĵojn de ĉ. 50 specoj. Ĝiaj laborejoj kaj loĝejoj etendiĝas je pluraj kilometroj. Fakte ĝi estas kemiindustria urbo en vera senco.



La Maŭzoleo de Sun Zhongshan (Sun Yatsen), la granda pioniro de la ĉina demokratia revolucio

En la pasintaj 30 jaroj ankaŭ aliaj industrioj de Nanjing ricevis sufiĉan disvolviĝon. Nun la urbo jam fondis pli ol 20 industriajn branĉojn, kiaj minoekspluato, metalurgio, meĥaniko, ŝipofarado, fabrikado de elektronaj kaj optikaj instrumentoj, tekstila kaj malpeza industrioj, kaj havas 2,000 fabrikojn, minejojn kaj aliajn entreprenojn kun 600,000 oficistoj kaj laboristoj.

Nanjing estas ankaŭ la trafika centro de orienta Ĉinio. Nanjing-haveno situas ĉe la malsupra baseno de Changjiang-rivero, estas la unua granda haveno de la rivero kaj la dua de Ĉinio. Post reformo kaj plikonstruado, 90% de la ŝarĝaj kaj malŝarĝaj laboroj de la haveno estis meĥanikigitaj. Ĝiaj fervojoj ligiĝas sude kun Shanghai kaj Hangzhou, norde kun Tianjin kaj Beijing kaj okcidente kun Wuhu. La Nanjing-a Pontego super Changjiang-rivero finkonstruita kaj ekuzita en 1968, multe faciligis la trafikon inter la nordo kaj la sudo. Ankaŭ la aviada afero ekhavis unuapaŝan disvolviĝon, la aviadaj linioj etendiĝas al dek grandaj urboj en la lando kaj pasintjare malfermiĝis nova aeralinio kondukanta rekte al Xianggang (Hongkong) por turistaj grupoj.

Kiel antikva kultura urbo, Nanjing havis grandan disvolviĝon en kulturo kaj eduko en la pasintaj 30 jaroj. Nun ĝi havas 20 superajn lernejojn. Krom la Nanjing-a Universitato raportita de nia gazeto en la pasinta jaro, ankaŭ la Nanjing-a Politekniko estas supera lernejo fame konata tra la tuta lando. Post sia fondiĝo en 1952 ĝi elkulturis preskaŭ 20,000 altgradajn inĝenierajn kaj teknikajn laborantojn. Instruistoj kaj studentoj de ĝia konstru-inĝeniera fakultato partoprenis eĉ en la projektado de la fame konataj konstruaĵoj de Beijing, kiaj la Popola Halo, la Ĉina Historia Muzeo, la Beijing-a Fervoja Stacio kaj la Memorhalo de Prezi-

danto Mao. Krome, la urbo havas 35 mezgradajn fakajn lernejojn kaj 2,150 mezgradajn kaj elementajn lernejojn. La nombro de lernantoj pliiĝis pli-ol-kvinoble kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo.

Krome, Nanjing havas sian gloran revolucionan historion. En 1853 la kamparanaj insurekciaj armeoj de la Taiping-a Ĉiela Regno konkeris Nanjing kaj prenis ĝin kiel sian ĉefurbon en 12 jaroj. Post la venko de la Revolucio en 1911, anakŭ d-ro Sun Zhongshan (Sun Jatsen) tie okupiĝis pri revoluciaj aktivecoj. Dum la periodo de Kuomintang-regado 100,000 revolucianoj kaj patriotoj estis mortigitaj ĉe la montpiedo Yuhuatai. Kamaradoj Zhou Enlai, Dong Biwu kaj aliaj veteranaj proletaj revolucianoj faris tie revoluciajn aktivecojn.

En Nanjing troviĝas multaj aliaj antikvaj vidindejoj, kiaj la lagoj Xuanwu kaj Mochou, la Maŭzoleo de Sun Zhongshan kaj Zijin-monto, kiuj tiras al si ĉiam pli multajn ĉinajn kaj fremdlandajn turistojn. Nun, oni tagnokte konstruas 37-etaĝan hotelon Jinling ĉe la urbocentro Xinjiekou, kiu akceptos gastojn en 1982 laŭ la plano. Sur ĝia plej alta etaĝo oni konstruos turneblan restoracion, en kiu turistoj povos preni ĉinajn frandajn pladojn kaj samtempe rigardi la vastan kaj torentan Changjiang-riveron, la majestan Zijin-monton kaj aliajn pejzaĝojn.

Strato de Nanjing






Sin prepari por naği

Foto de LU BO

Geknaboj en la somera kampado

Iri al la kampado



Survoje al la monto

Somero estas la plej varma sezono en la jaro. Por ke la geknaboj de la elementaj lernejoj bone pasigu siajn somerajn feriojn, la Infana Domo de Haidian-distrikto de Beijing organizis por ili someran kampadon. La infanoj surgrimpis Xiangshan-monton, rigardis tie sunleviĝon, vizitis Biyun-templon kaj botanikan ĝardenon kaj organizis kampfajran vesperon.



Kaptado de insektoj

Fari pasteĉojn




Prepari tagmanĝon





Frumatene, la geknaboj, gvidataj de siaj instruistoj, ĝoje ekmarŝis al la antaŭurbo portante kuirilojn, farunon, viandon kaj legomojn. Ili rigardis la pitoreskejon kaj kolektis specimenojn de diversspecaj plantoj kaj insektoj. Tagmeze, ili mem preparis abundan tagmanĝon. Iuj kunestis por historio-rakontado, aliaj pentris pejzaĝon kaj triaj dancis gaje.

Fotoj de **WANG SHOULIANG**



Jen pasteĉoj estas kuiritaj.

Kolektado de specimenoj de plantoj



Skizi kampadan vivon

Tombo-ŝtonoj de tri misiistoj en Beijing restarigitaj

de YU XIWEN kaj MAO DEJIN


LASTATEMPE, la tombo-ŝtonoj de tri fame konataj fremdlandaj misiistoj italo Matteo Ricci, germano Johann Adam Schall von Bell kaj belgo Ferdinand Verbiest estis restarigitaj en Chegongzhuang de Beijing (Pekino). La tri tombo-ŝtonoj kun historio de 200-300 jaroj estis faligitaj en la komenco de la kultura revolucio kaj nun jam riparitaj laŭ siaj originalaj formoj. La tri tombo-ŝtonoj staras en verdaj arbaroj kiel simbolo de amikeco inter la ĉina popolo kaj la popolo de okcidenta Eŭropo.

Matteo Ricci estis fame konata misiisto de la katolika eklezio en la 16-a jarcento. En 1582 li venis al Ĉinio por prediki religion, unue atingis Aomen (Aŭmen) kaj tie diligente lernis la ĉinan lingvon. En la sekvanta jaro li venis al Zhaoqing de Guangdong-provinco kaj tie fondis preĝejon. En 1601 li venis al Beijing, prezentis al la imperiestro Shengzong de Ming-dinastio proponojn kaj la portreton de

Jesuo, horloĝon kaj mondan mapon. La imperiestro akceptis lin, traktis lin kiel honoran gaston kaj donis al li altan salajron kaj loĝejon en la urbo. Ĉar li bone sciis la ĉinan kaj aliajn lingvojn, geografion kaj medicinion, tial la imperiestro lin ŝatis. Ministroj Xu Guangqi kaj Li Zhizao ricevis bapton de li kaj lernis de li astronomion, matematikon kaj pafil-faradon. La fama verko de Eŭklido "Geometria Origino" kune tradukita de Xu Guangqi kaj Matteo Ricci estis la geometria verko plej frue enkondukita en Ĉinion.

En majo de 1610 Matteo Ricci mortis de malsano en Beijing. La imperiestro faris ordonon doni 20 muojn da tero kaj 38 ĉambrojn por lukse entombigi lin.

Je la 11-a jaro post la morto de Matteo Ricci, misiisto de germana eklezio, Johann Adam Schall von Bell, venis al Ĉinio kaj okupiĝis pri traduko de verkoj, prilaboro de kalendaro,



La tombo-ŝtono de Matteo Ricci

farado de instrumentoj, sunhorloĝoj, stelhorloĝoj kaj lornoj, ktp. En 1630 li partoprenis en prilaborado de kalendaro kaj kompilis "La Kalendaron Chongzhen", de tiam Ĉinio komencis apliki novan kalendaron. En 1666 li mortis en Beijing.

Ferdinand Verbiest venis al Beijing en 1660. Li estis grava helpanto de Johann Adam Schall von Bell. Poste li respondecis pri la Imperiestra Instituto de Meteorologio kaj kalendaro, farado de astronomiaj instrumentoj, mezurado de longitudoj kaj latitudoj kaj ellaborado de mapoj de diversaj lokoj de Ĉinio. Liaj verkoj estas sufiĉe multaj.

KVAR TAJLOROJ

(Humoraĵo)

de Rauczynski Ryszard (Pollando)

En malgranda urbo sur la sama strato loĝis kvar tajloroj Gravulo, Fierulo, Fanfaronulo kaj Modestulo.

Por atentigi la klientojn pri sia bona laboro, la Gravulo pendigis ĉe la pordego de sia laborejo elpendaĵon kun jenaj vortoj: La plej sperta tajloro en la urbo.

Vidante tion la Fierulo pendigis ŝildon kun jena surskribo: La plej sperta tajloro en la tuta distrikto.

Vidante tion la Fanfaronulo elpendigis ŝildon kun jena surskribo: La plej sperta tajloro en la lando.

Kaj la Modestulo pendigis ŝildon kun jena surskribo: La plej sperta tajloro en la tuta strato.





Mao

de HE QIZHI

Dun kaj lia

“MEZNOKTO”

LA fama ĉina veterana verkisto Mao Dun estas unu el la pioniroj de la ĉina moderna literaturo kaj ĝuas apartan renomon inter la ĉinaj literaturistoj. En la Kvara Kongreso de Ĉinaj Literaturaj kaj Artaj Laborantoj okazinta en 1979, li estis elektita kiel honora prezidanto de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj kaj prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio.

Mao Dun estas la plumnomo de Shen Yanbing (Ŝen Janbing), kiu naskiĝis en julio de 1896 en la akvoriĉa urbeto Wuzhen de Tongxiang-gubernio, Zhejiang (Ĝegiang)-provinco. Lia patro iom lernis medicinon kaj estis influita de demokratiaj pensoj, tamen li forpasis kiam Mao Dun estis 10-jara. La patrino estis bone edukita virino kun forta karaktero kaj sufiĉe da prudento, kaj ŝi donis bonan edukon al sia filo ekde lia infanaĝo. Krome, ŝi ankaŭ helpis lin legi multe da ĉinaj klasikaj literaturaĵoj, tiel ke li metis solidan fundamenton por literatura verkado. Post sia diplomitiĝo en mezlernejo en 1913, Mao Dun sukcese trapasis eniran ekzamenon de prepara kurso de la Beijing-a Universitato kaj fariĝis ĝia studento. Post la diplomitiĝo li tamen ne povis daŭrigi sian studon pro ekonomia malfacilo de la familio kaj

eklaboris en la redaktejo de la Komerca Libropresejo en Shanghai (Ŝanhajo), en la jaro 1916. Ekde tiam li faris literaturan aktivadon.

En 1919, la novkultura Movado de la Kvara de Majo¹ skuis la tutan socion de Ĉinio. Kiel intelekta junulo, Mao Dun aktive partoprenis en tiu revolucia movado. En 1921, kune kun Zheng Zhenduo, Ye Shengtao kaj aliaj li iniciatis la starigon de nova literatura societo Literatura Instituto, kiu pledis por realisma literaturo servanta “por la vivo” kaj oponis kontraŭ “arto por arto”. Li fariĝis ĉefredaktoro de ĝia organo “Noveloj de la Monato”, renovigis ĝian enhavon, tiel ke ĝi fariĝis proparlanto de la nova literaturo. En tiu tempo Mao Dun aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

En la periodo de 1926 ĝis 1927, li partoprenis en la efektiva batalo de la Unua Enlanda Revolucia Milito² en Guangzhou (Kanton) kaj Wuhan (Vuhan).

Post la fiasko de la Granda Revolucio en 1927, Mao Dun veturis al Japanio. En printempo de 1930 li revenis al Shanghai, aliĝis al la Unio de Ĉinaj Maldekstralaj Verkistoj³ kaj kune kun Lusin okupiĝis pri gvidado super la maldekstrala literatura kaj arta movado.

En la tridekaj jaroj, plej abunde fruktodona estis la verkado de Mao Dun kaj lia ĉefverko “Meznokto” aperis en la komenco de 1933 kaj poste li verkis la brilajn novelojn “Printempaj Silkraŭpoj”, “La Butiko de la Familio Lin” k.a.

Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito (1937-1945) kaj la Libera Milito (1945-1949), Mao Dun persistis en verkado malgraŭ migrado kaj malfacilaĵoj en vivo. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, li laboris dum longa periodo kiel estro de la Ministerio de Kulturaj Aferoj de la Centra Popola Registaro.


Multflanka estas literatura aktivado de Mao Dun. Krom verkado de 7 romanoj, 4 mezlongaj romanoj, pli ol 50 noveloj kaj dramoj, eseoj ktp., li sin okupis ankaŭ per tradukado de eksterlandaj literaturaj verkoj, studo pri ĉinaj klasikaj literaturaj verkoj kaj literaturaj kaj artaj teorio kaj kritikado. Lia verkado nombras pli ol dek milionojn da ideografiaĵoj. Tamen Mao Dun aktivadis en la ĉina literatura kampo ĉefe kiel elstara romanisto. La apero de lia romano “Meznokto” skuis la ĉinan literaturan mondon. Laŭ ĉina antikva temposistemo, meznokto signifas temperon de la 23-a horo ĝis la 1-a horo de la sekvanta

tago. Per tiu titolo la aŭtoro aludas, ke la romano temas pri la okazaĵo en la plej malluma tempo antaŭ la tagiĝo de Ĉinio.

La verkado de "Meznokto" estis farita post sufiĉa kovado kaj preparado. Dum la periodo fine de somero kaj komence de aŭtuno de 1930, Mao Dun ne povis legi nek skribi pro stomaka kaj okulmalsanoj, tial ĉiutage li vizitadis parencojn kaj amikojn. Li kontaktiĝis kun multaj industriaj entreprenistoj, bankieroj, komercistoj, oficistoj ktp., kaj havis ŝancojn por propraokule vidi personojn, kiuj "freneze spekulis en borso" aŭ "ĉiamaniere klopodis kolekti akciulojn por fondi ian fabrikan." Kaj tiam venis en lian kapon la deziro priskribi fenomenojn en la ĉina socio en la vasta historia fono. En la sekvanta jaro, kiam lia sano pliboniĝis, li komencis sian verkadon.

Li prenis la kontraŭdiron kaj luktheadon inter nacia industria kapitalisto Wu Sunfu kaj kompradora financa kapitalisto Zhao Botao kiel la ĉefan fadenon interligantan ĉiujn partojn de la tuta romano, kaj ĉirkaŭ tiu fadenon la rakonto spegulas la vivon de la Shanghai-a burĝa socio en la periodo inter printempo kaj somero de 1930 kaj la fizionomion de la ĉina socio kun disvolviĝanta revolucio.

La heroo en la romano "Meznokto" Wu Sunfu estas tipa figuro muldita de la aŭtoro kun aparta intenco. Li estas nacia kapitalisto kun granda ambicio kaj sufiĉa kuraĝo. Li deziras prosperigi la naciajn industrion kaj komercon, li estas terure avida kaj kruela kaj englutis per unu fojo 8 malgrandajn fabrikojn, dank' al siaj ekonomiaj fortoj. Sed en la duonkolonia



Kamarado Mao Dun en laboro

kaj duonfeŭda socio, li devas batali samtempe sur diversaj frontoj: li devas kontraŭartifiki arogantan kaj ruzan agenton de imperiistoj Zhao Botao, kiu lin katenadas; li laŭeble suĉas la sangon de laboristoj por kompensi siajn perdojn en borso, kio tamen kaŭzis furiozan strikan tajdon en liaj fabrikoj; li kaprompas pro la malgrandaj fabrikoj, kiujn li sukcesis aĉeti post klopodado kaj kiuj tamen fariĝis por li ne-demetebaj "malsekaj roboj"; liaj fabrikoj kaj la kreditokompanio funkciigata de li kune kun aliaj ne povas eskapi el sia plena fiasko pro la interbatalado de militaristoj, bankroto en la kamparo, superproduktado de la fabrikoj kaj la grandskala ekonomia blokado fare de Zhao Botao, kaj sekve lia granda ambicio kreviĝis kiel sapveziko. Tiamaniere, "Meznokto" sukcese muldis tipan figuron de la ĉina nacia burĝaro en la tridekaj jaroj tra la komplikaj sociaj interrilatoj. La tragedio de Wu Sunfu ne estas sekvo de liaj personaj kulpoj, sed socia tragedio neevitebla por la ĉina nacia burĝaro sub la imperiisma

agresado, kaj ĝuste tio estas la profunda objekto spegulata de tiu romano.

La sukcesa muldado de la figuroj de Wu Sunfu kaj Zhao Botao, ankoraŭ pli lerta kaj kruela kompradora kapitalisto sin apoganta sur usona kapitalo, estas grava kontribuo de la romano al la ĉina moderna literaturo. Kaj krome, la aŭtoro muldis en "Meznokto" ankaŭ aliajn figurojn kun klaraj karakteroj, kiel ekzemple, kruelan putran feŭdan bienulon, sagacan kaj ruzan kapitalistan lakeon kaj lakeoj-literatorojn sin vivtenantajn per paneroj postlasitaj de la burĝaro, ankaŭ en tio li atingis grandan sukceson.

Mao Dun estas vera lingva majstro de Ĉinio. Li estas lerta en penetra kaj delikata priskribado de karakteroj de personoj kun montrado de ilia animo en akraj kontraŭdiroj kaj la vivotorento de la epoko. La lingvo de "Meznokto" estas lakona, delikata, viveca kaj forta. La lingvo de la personoj en la romano estas konforma al iliaj karakteroj kaj alprenas variajn nuan-

cojn laŭ la disvolviĝo de la intrigo kaj ŝanĝiĝo de la karakteroj, tiel ke la legantoj sentas, kvazaŭ ili vidus kaj aŭdus ilin ĉeloke; tio multe grandigis la artan efekton de la romano.

En tiu verko, ĉirkaŭ la ĉefa fadeno de batalado inter Wu Sunfu kaj Zhao Botao, tie kaj ĉi tie, rekte aŭ alude montriĝas vigla disvolviĝo de la revoluciaj fortoj. Ĉe la fino de la romano, alegoria mencio pri la ĉiama plifortiĝo de la Laborist-Kamparana Ruĝa Armeo en la revolucia bazloko en kontrasto kun la fiasco de Wu Sunfu montras la ve-

ran eliron por Ĉinio kaj profunde impresas la legantojn.

Kompreneble, ankaŭ "Meznokto" havas sian mankon, ĉefe en tio, ke la revolucia batalo kaj laboristaj figuroj estas priskribitaj malpli forte. Tio estas kaŭzita de la travivaĵoj de la verkinto. La romano pritraktas tri specojn de personoj: kompradora burĝaro, nacia burĝaro kaj revoluciuloj kaj laboristoj. Pri la unuaj du specoj la verkinto faris relative bonan observadon pri iliaj aktivadoj kaj havis relative bonan konon, sed pri la tria li nur legis materialon aŭ informi-


ĝis per rakontoj. Tial, la priskribo pri la unuaj estas viveca kaj fidela, dum tiu pri la revoluciuloj kaj laboristoj estas relative pala kaj nesufiĉe riĉa kaj fidela.

Tamen makulo ne povas senbriligi belan jadan. "Meznokto" ja estas majstra realisma verko en la historio de la ĉina moderna literaturo kaj mejloŝtono sur la vojo de kreado de Mao Dun. Ĝi estas tradukita en dekelkajn lingvojn inkluzive de la angla, franca, germana, japana kaj rusa kaj estas bone akceptata de diverslandaj legantoj.

Hodiaŭ, la pli-ol-80-jara literatura majstro Mao Dun koncentras sian energion ĉefe al skribado de siaj rememoroj, kies partoj jam aperis en la trimonata gazeto "Historia Materialo pri la Nova Literaturo" kaj vekis atenton kaj intereson de la vasta legantaro.

Wu Sunfu ĝisfunde bankrotis en akcia spekulado en borso.

Ilustrita de YE QIANYU



1. La novkultura Movado de la Kvara de Majo eksplodinta en la 4-a de majo, 1919, estis granda revolucia batalo de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo kaj ankaŭ movado ĝisfunde oponanta kontraŭ la feŭda kulturo. Ĝi markis la komenciĝon de la novdemokratia revolucio de Ĉinio.

2. La Unua Enlanda Revolucia Milito (1924-1927) estis granda revolucia milito de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio.

3. La Unio de Ĉinaj Maldekstralaj Verkistoj estis revolucia literatura rondo sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio. Ĝi fondiĝis en Shanghai en marto de 1930. Inter ĝiaj gvidantoj estis Lusin, Xia Yan kaj Feng Xuefeng. Ĝi estis malorganizita en 1935 konforme al la nova situacio de la Kontraŭjapana Nacisava Movado.

Meznokto

(Fragmento)

Ĉi sube estas la unua paragrafo de la romano "Meznokto". Per priskribo de vesperiĝo ĉe Suzhou-rivero en majo, la aŭtoro prezentas la atmosferon de la medio, kaj per rakonto pri la veturado de maljuna sinjoro Wu per aŭto en la urbegon Shanghai li priskribas la karakteron de la lasta. En tiu ĉi fragmento vi povas vidi la originalan stilon de la lingvo de la aŭtoro karakterizitan per klareco, delikateco kaj brilaj koloroj.

— La Redakcio

La suno ĵus subiris la horizonton. Milda venteto jen kaj jen tikle karesis la vizaĝojn. La kota akvo en Suzhou-rivero fariĝis ore verda kaj fluadis kviete okcidenten. La vespera tajdo de Huangpu-rivero jam altiĝis nerimarkite kaj nun la diversspecaj boatoj laŭlonge de la bordoj de Suzhou-rivero tiel alte leviĝis, ke iliaj ferdekoj kuŝis ĉ. duonfuton super la kajoj. Albloviĝis muziko el la parko Waitan kaj estis tiel malforta, ke plej klare aŭdiĝis nur la ĝojekscita tamburado, simila al krakado de bakataj sojfaboj. En la vespera krepusko, la alte staranta ŝtalframo de la Ekstera Baidu-ponto estis vualita de maldensa nebulo. Kiam tramo trapasis la ponton, la drato pendanta sub la supro de la ŝtalframo disĵetis de tempo al tempo brile verdajn sparkojn. Rigardante orienten de sur la ponto, oni povis vidi la staplojn de fremdaj firmoj ĉe la kajo de Pudong kiel gigantajn monstrojn kaŭrantajn en krepusko kun lampoj similaj al centoj da trembrilantaj malgrandaj okuloj. En la okcidento oni vidis je surprizo grandegan neon-anoncon sur la tegmento de eŭropstila domo, kiu disradiis fajran ruĝon kaj fosforeskan verdon: LIGHT, HEAT, POWER*.

Tiam, en tiu paradiza vespero de majo, tri Citroen-aŭtoj de 1930-

modelo fulme trakuris la Eksteran Baidu-ponton kaj sin turninte okcidenten rapidis rekte al la Norda Suzhou-strato.

Trapasinte la t.n. "Feran Straton" okcidente de la Domo de la Shanghai-a Komerca Ĉambro ĉe la angulo de la Norda Henan-strato, la tri aŭtoj malrapidiĝis ĉe la loko kie kolektiĝis vaporŝipoj de riveraj veturlinioj. La ŝoforo de la unua aŭto diris mallaŭte al la kolosa fortulo sidanta apude en nigraj silkaj vestoj:

"Daishengchang-kompanio, ĉu ne, Guan?"

"Jes ja!" respondis Guan, same mallaŭte. "Ĉu vi forgesis? Certe vi ebriiĝis de tiu virinaĉo!"

Kiam tion diris Guan, kiu estis korpogardisto, li montris siajn fortajn dentegojn ŝajne kapablajn mordrompi draton. Jen la aŭto subite haltis. Guan haste desaltis, ekpalpis la Browning-revolveron ĉe la talio kaj faris ĉirkaŭrigardon. Poste li iris malfermi la pordon de la aŭto, kaj tion farinte li staris apude kun severa kaj timiga aspekto. El la aŭto ŝoviĝis kapo — purpura kvadrata vizaĝo kun densaj brovoj, rondaj okuloj kaj multaj aknoj. Konstatinte ke la pordo de la kontraŭa dometo ĝuste portas la ŝildon

kun la nomo "Ŝipkompanio Daishengchang", tiu homo rapide descendis kaj iris rekte en la pordon kun Guan lin sekvanta.

"Ĉu la Fluganta Nubo baldaŭ alvenos?" demandis la purpurvizaĝa viro per laŭta kaj aroganta voĉo. Li estis ĉirkaŭ kvardek-jara, altstatura fortikulo kun sinteno tiel impona, ke oni povas tuj diveni ke li estas potenca komercisto al kutimiĝinta al donado de ordonoj. Apenaŭ finiĝis liaj vortoj, la ĉeestantaj oficistoj de la ŝipkompanio ekstaris kiel unu persono, kaj malgrasa altulo inter ili faris paŝon antaŭen kun radianta rideto.

"Jes, baldaŭ!" li diris respekto-plene. "Sinjoro la Tria**, bonvolu sidi momenton. Alportu teon, knabo."

Tion dirante, la malgrasa altulo altiris seĝon kaj metis ĝin post la dorson de la sinjoro, kies muskolo sur la vizaĝo ekspasmis kvazaŭ por rideto. Li ĵetis unu rigardon al la malgrasa altulo kaj poste turnis siajn okulojn eksteren de la pordo. Dume forveturis la aŭto de Sinjoro la Tria, la dua okupis ĝian lokon, paro da geviroj eliĝis kaj venis ankaŭ en la oficejon. La viro estis malalta kaj diketa kun blanka vizaĝo tre afabla. La virino estis multe pli alta. Ankaŭ ŝia vizaĝo

estis kvadrata, iom simila al tiu de Sinjoro la Tria, tamen ŝia haŭto estis delikata kaj brila. Kvankam ili ambaŭ jam havis aĝon de pli ol 40 jaroj, tamen pro siaj modajoj ŝi aspektis nur ĉirkaŭ tridekjara. La viro ekparolis la unua:

“Sunfu, ĉu ni atendu ĉi tie?”

Antaŭ ol la purpurvizaĝa Sunfu faris respondon, la malgrasa altulo de la ŝipkompanio jam diris ride-tante:

“Jes, jes, sinjoro Du. Mi jam aŭdis ĝian fajfon kaj sendis atendi tie; kiam la ŝipo albordeĝis, oni venos raportiti. Atendu maksimume kvin minutojn. Nur kvin minu-tojn!”

“Ha, Fusheng, vi ankoraŭ estas ĉi tie. Bone! Estas necese persisti en via ofico. La maljuna sinjoro ofte diris, ke vi estas ĉiam lernema. Jam plurajn jarojn vi ne vidis mian patron, ĉu ne?”

“Mi vizitis la maljunan sinjoron lastamonate, kiam mi reiris al la hejmvilaĝo. Bonvolu sidiĝi, sinjorino Du.”

Aŭdinte la laŭdon de sinjorino Du, la malgrasa altulo Fusheng ekzaltiĝis de ĝojo, kaj respondante li altiris du aliajn seĝojn, ilin metis post la dorsojn de gesinjoroj Du kaj poste ilin servis per teo kaj cigaredoj. Li estis la filo de maljuna ser-visto de Wu-familio kaj estis tre lerta kaj sprita knabo, tial la mal-juna sinjoro Wu diris al sia filo Sunfu, ke li havigu al li laboron en la Ŝipkompanio Daishengchang. Tamen Sunfu kaj la alia paro rigardadis eksteren anstataŭ sidiĝi. Sur la vojo antaŭ la pordo staris alia alta fortulo kun la dorso al la pordo, rigardante jen dekstren jen maldekstren. Tiu estis la korpogardisto de sinjoro Du Zhuzhai, la edzo de la fratino de Wu Sunfu.

Sinjorino Du ekĝemetis pro li-berigo de zorgo kaj sidiĝis la unua, poste ŝi elprenis silkan tukon kun presitaj desegnaĵoj, viŝetis per ĝi

siajn lipojn kaj diris trans sia ŝultro al Sunfu:

“Fraĉjo tria, lastjare kiam mi hejmen reiris kun Zhuzhai por viziti la prapatrajn tombojn, ni veturis per la sama ŝipo Fluganta Nubo. Ĝi estas rapida ŝipo kaj ne haltis survoje, kaj la veturado bezonis nur iom pli ol duontagon, sed ĝi balancigis terure, ke miaj artikoj doloris al mi. Paĉjo certe suferis multe ĉifoje. Pro hemiparalizo, la duono de lia korpo apenaŭ povas sin movi. Zhuzhai, ĉu vi memoras kiel paĉjo plendis lastjare, ke li sentas kapturniĝon pro longa sidado? . . .”

Sinjorino Du paŭzis kaj ekĝemetis, kaj ŝiaj okuloj iom ruĝiĝis je la randoj. Ŝi estis daŭrigontasian parolon, kiam subite enflugis fajfo de sireno. Tuj sekve enkuris homo kriante:

“La Fluganta Nubo jam alkajiĝis!”

Ankaŭ sinjorino Du tuj stariĝis kun mano sur la ŝultro de Du Zhuzhai. Tiam Fusheng jam komencis kuregi eksteren kaj diris kun returnita kapo:

“Sinjoro la Tria, gesinjoroj Du, ne rapidu. Mi unue faru aranĝon, kaj vi venu poste!”

Ankaŭ aliaj oficistoj de la ŝipkompanio komencis aĝi urĝeme kaj aŭdiĝis vokoj al portistoj. Je ordono, du fortaj portistoj elportis grandan kanseĝon antaŭe pretigitan. Kun rigardo direktita eksteren, Wu Sunfu diris al sinjorino Du:

“Franjo, revenvoje vi veturu kun paĉjo en la aŭto n-ro 1889, nia kvara fratineteto veturu kun mi kaj Zhuzhai veturu kun Axuan.”

Sinjorino Du kapjesis kaj direktante la rigardon eksteren ŝi movetadis siajn lipojn — ŝi silente recitadis budhan sutron! Kun cigaro en la buŝo, Du Zhuzhai ĵetis unu rigardon al Wu Sunfu ridetante kvazaŭ dirante: “Ni iru.” Ĝuste tiam Fusheng envenis kun kuntiritaj brovoj pro embaraso:

“Kia hazarda ĝenaĵo! Iu trenŝipo de la Shanghai-Suzhou-a linio okupas la ankrejon.”

“Ne gravas. Ni iru sur la kajon por vidi!” Wu Sunfu interrompis lin kaj eliris. Ankaŭ korpogardisto Guan rapide kuris post li. Lin sekvis Du Zhuzhai kaj lia edzino, krome ankaŭ Fusheng, kaj la korpogardisto de Du Zhuzhai, kiu antaŭe staris ĉe la pordo, iris la lasta.

La Fluganta Nubo vere ankris sin trans trenŝipego, konata kiel ŝipo de la kompanio. La granda kanseĝo jam estis metita sur la pruo de la ŝipo kaj la du fortaj portistoj staris apude. Sur la kajo estis kviete kaj ne troviĝis senokupuloj; kelkaj oficistoj de la ŝipkompanio estis kriantaj por forpeli la rikiŝistojn kaj kolportistojn kiuj provis alproksimiĝi. Kiam Wu Sunfu kaj la du aliaj surpaŝis la ferdekon de la kompania ŝipo, la maljuna sinjoro Wu jam eliris subtenate de servisto de la Fluganta Nubo kaj sidiĝis en la kanseĝon. Fusheng tuj alsaltis kaj gestis al la du portistoj, ke ili levu la maljunan sinjoron kaj malrapide lin portu sur la kompanian ŝipon. Tiam alpaŝis liaj gefiloj kaj bofilo por lin vidi. Kvankam laciga estis la veturado, tamen la vizaĝo de la maljuna sinjoro aspektis ne malsane, escepte de la ruĝaj makuloj ĉe la tempioj. Sed li diris nenion, kaj ekrigardinte al siaj gefiloj kaj bofilo li nur balancetis la kapon kaj fermis la okulojn.

Dume ankaŭ lia kvara filino Hui-fang kaj lia sepa filo Axuan preme surpaŝis sur la kompanian ŝipon.

“Ĉu paĉjo bone fartis survoje?” demandis mallaŭte sinjorino Du, la dua filino de maljuna sinjoro Wu, ekkaptinte sian pli junan fratinnon.

“Ne malbone. Tamen li diradis, ke li sentas kapturniĝon.”

“Ni tuj enaŭtiĝu!” diris Wu Sunfu malpacience. “Fusheng, iru diri al la ŝoforo alveturigi unue la novan aŭton n-ro 1889.”

Lasante la maljunan sinjoron sub la zorgo de la du filinoj, Wu Sunfu, Du Zhuzhai kaj Axuan la unuaj surbordiĝis. La aŭto n-ro 1889 alvenis kaj ankaŭ la kanseĝo surbordiĝis. La maljuna sinjoro Wu enaŭtiĝis subtenate de la helpantoj kaj lia dua filino, sinjorino Du, sidigis apud li. Incitate de la aromo de ŝia korpo, la maljuna sinjoro Wu malfermis siajn okulojn por ekrigardi kaj diris malrapide per tremanta voĉo:

“Ĉu estas vi, Fufang? Mi volas ke Huifang venu! Huifang! Kaj ankaŭ Axuan venu!”

Tion aŭdis Wu Sunfu en la malantaŭa aŭto kaj ekkuntiris siajn brovojn, li tamen diris nenion. Li

sciis, kiel stranga kaj obstina estas lia patro. Tion sciis ankaŭ Du Zhuzhai. Sekve do Huifang kaj Axuan ascendis la aŭton de la maljuna sinjoro. Ne volante forlasi sian patron, Fufang restis ĉe sia loko, tiel ke la patro kunpremiĝis inter siaj du filinoj. La motoro ekbruis kaj la aŭto n-ro 1889 en fronto jam ekmoviĝis, kiam maljuna sinjoro Wu ekkriis akraŭoĉe:

“La Plej Altan Libron pri Rekompencoj kaj Punoj!”

Tio estis stranga kaj akrasona krio. En tiu krio la flagranta vivo de la maljuna sinjoro ŝajne revigliĝis, liaj kadukaj okuloj ekbrilis kaj la ruĝaj makuloj ĉe liaj tempioj

malheliĝis, kvankam liaj lipoj tremadis.

La ŝoforo de la aŭto n-ro 1889 tuj bremsis la aŭton kaj returnis sian vizaĝon en konsterniĝo. Haltis sekve ankaŭ la aŭtoj de Wu Sunfu kaj Du Zhuzhai. Neniu sciis kio okazis. Nur Huifang komprenis kion la maljuna sinjoro volas. Vidante ke Fusheng staras tie, ŝi diris al li:

“Fusheng, iru tuj al la granda manĝoĉambro de la Fluganta Nubo por alpreni ‘La Plej Altan Libron pri Rekompencoj kaj Punoj!’ Ĝi estas en flavsilkaĵa librojo!”

De kiam la maljuna sinjoro Wu falis de sur ĉevalo, vundis sian gambon kaj hemiparaliziĝis antaŭ pli ol dudek jaroj, li fariĝis pia kredanto de la instruoj en “La Plej Alta Libro pri Rekompencoj kaj Punoj” kaj ĉiam ĝin studadis. Krom ĝin presigi kaj disdonaci, li zorge ĝin kopiis propramane kun respekto kaj tenadis la kopiitan ekzempleron kun si ĉiam ajn.

Baldaŭ Fusheng revenis kun la flavsilkaĵa librojo. Maljuna sinjoro Wu ĝin prenis, respektoplene ĝin metis sur siajn genuojn kaj refermis siajn okulojn kun trankvila rideto apenaŭ rimarkebla sur la ŝrumpintaj lipoj.

“Startigu!” mallaŭte sinjorino Du ordonis la ŝoforon. Ŝi faris longan elspiron pro trankviliĝo kaj malantaŭen klinis sian kapon sur la kusenon de la sidilo kun nedetenebla rideto. La aŭtoj ĉiam pli rapidiĝis, kurante orienten laŭ la Norda Suzhou-strato. Atinginte la Eksteran Baidu-ponton, ili sin turnis suden kaj poste ekkuregis kiel vento kun rapideco de duona mejlo en ĉiu minuto, la rekorda rapideco por la modelo de 1930.

* Anglaj vortoj signifantaj: Lumo, Varmo, Povo.

** Por montri sian respekton, servistoj en la malnova Ĉinio ofte nomis la gefilojn de sia mastro per sinjoro la unua, dua, tria k.t.p. laŭ ilia naskiĝvico.

Maljuna sinjoro Wu svenis.

Ilustrita de YE QIANYU





La baleta

“Al la Luno”

de LAO BAI

EN Ĉinio cirkulas multaj belaj emociaj mitoj, inter kiuj “Paffaligi 9 Sunojn” kaj “Al la Luno” popularas jam de jarmiloj. La dancistoj ilin surscenigis lastjare surbaze de la ĉinaj dancoj klasikaj kaj folkloraj, sorbante dancvortojn el Okcidenta baleta kaj moderna danco.

La Baleta Trupo de la Shanghai-a Opera Teatro prezentis la nomitan baletan en urbegoj Shanghai (Ŝanhajo). Beijing

(Pekino) kaj Tianjin (Tiangin) kaj ricevis laŭdojn de ĉinaj kaj fremdlandaj spektantoj. Usona poeto Paul Engle diris, ke li vidis plej kreivan dancarton. Kaj en sia recenzo franca sociologo Evelyne Sullerop montris, ke ĝuante la mirindan spektaklon, ŝi kvazaŭ venus inter la feinojn de la ĉina antikva rakonto.

La baleta priskribas pratemon de Ĉinio. Dek sunoj brulis sur la ĉielo, la tero estis varmega kaj la popolo suferis de soifo

kaj malsato. La demono Pangmeng trompe diris al la popolo, ke li povas peti pluvon de la Ĉielo, se oni oferos la belulinon Chang-e al ĝi. Tiam la bravulo Houyi paffaligis naŭ el la dek sunoj per magiaj sagoj. Tuj ekpluvis kaj ĉiuj kreskaĵoj reviviĝis. La savita Chang-e kaj la popolo tre dankis la bravulon.

Iun tagon, kiam la sunpafinto ripozis dormante en arbaro, venis Chang-e kaj aliaj knabinoj kun senbrujaj paŝoj kaj ekdancis. Chang-e metis sian amatan florkronon apud la kapo de Houyi. Vekiĝinte, la kuraĝulo rekonis Chang-e inter la knabinoj. Li estis ravita de ŝia beleco kaj ili falis en amon. En ilia geedziĝa nokto enŝoviĝis la demono por ŝteli la magian pafarkon de Houyi. Chang-e rimarkis tion kaj ekluktis kun li. Ŝi svenis pro forta bato. Alkuris la novedzo. La demono sorĉe transformiĝis en elegantan junulon, kiu kun ŝajnigita amo eklevis la virinon senkonsciigintan kaj dancis kun ŝi. Vidante tion, la edzo miskomprenis ke ŝi perfidis lin. En granda malĝojo li devigis la edzinon engluti pilolon por forlasi la homan mondon. Ne povante klarigi al la edzo sian senkulpecon, la kompatinda virino adiaŭis sian edzon kun bedaŭro kaj englutis la pilolon. Baldaŭ, post kiam la lasta travidis la artifikon, Chang-e jam malrapide le-



viĝis al la ĉielo. La edzo postkuris la flugantinon ĝis antaŭ la luno kaj estis faligita de la demono per sago. La vundito indigne eltiris la sagon el sia korpo, pikmortigis la demonon per ĝi kaj ankaŭ li mortis.

La baletoj priskribas lukton inter bono kaj malbono kaj faris novan provon en dancarto. En sola kaj duopa dancoj por prezenti amon inter la geherooj oni prenis dancmovojn de eŭropa baletoj kaj moderna danco kiel grandan salton kaj altan levadon, kiuj esprimis la sentimenton de la herooj kaj montris ankaŭ plastikan belecon. Por prezenti la ebriigon de Houyi, kiu drinkas malĝoje post la forpelo de sia edzino, la artisto dancis per malrapidaj movoj kiel tiuj en filmo, samtempe sur la scenejo turniĝis la ĉielo kaj la tero kaj balanciĝis la arboj. Ĉio ĉi tio donis impreson tre freŝan al la rigardantoj.

La Baleta Trupo de la Shanghai-Opera Teatro fondiĝis en 1956. La ĉefaj kreintoj de la nomita baletoj Shu Qiao kaj Zhong Lin estas eminentaj dancistoj. En la kvindekaj jaroj ili kreis kaj prezentis la mitan baletojn "Lotuslanterno" kaj en la sesdekaj jaroj nacian baletojn "Societo de Glavoj", kiu prezentis la justan batalon de la ĉina popolo kontraŭ fremdlanda agreso. Ambaŭ baletoj rice-

vis varmajn aplaŭdojn de la rigardantoj. Shu Qiao, 48-jara, sin okupis pri dancarto jam pli ol 30 jarojn. Ŝi ludis diversajn rolojn kun malsamaj karakteroj, kiel ekzemple, bravan heroinon — ĉefrolon de "Societo de Glavoj" kaj firmvolan knabon, akcesoran rolon en "Lotuslanterno". Ŝiaj koregrafiaĵoj estas elegantaj kaj iniciativaj. Ŝi estas diligenta esploranto en disvolvo de la ĉina dancarto.

"Al la Luno" vekis varman disputon en niaj dancistaj rondoj. Iuj opiniis, ke ĝi devas esti prezentata ĉefe per tradiciaj kla-


sikaj dancoj, kaj nun ĝi havas tro multe da fremdaj dancvortoj. Sed la plejparto de la komentistoj diris, ke la sukceso de la baletoj estas ĝuste en tio, ke ĝi rompis rutinojn de la ĉina nacia baletoj, postulatajn de la evoluo de la intrigoj kaj la karakteroj de roloj. Ili opiniis, ke la ĉina nacia baletoj ne devas sin kateni en ia sensanĝa formo kaj stilo, sed devas malfermi al si novan kampon kaj krei sian originalan stilon.

"Al la Luno" ja estas nova valora provo de la ĉina nacia baletoj.



Houyi multe drinkas malĝoje post la forpelo de sia edzino Chang-e.

Pentritaj de **DONG CHENSHENG**



*Reĝisorino Lycette Darsonval
direktas ĉinajn baleistinojn.*



MAJSTROJ PARIZA TEATRO E

LA baletto "Sylvia" 104-jare konservata de la Pariza Opera Teatro — la lulilo de franca baletto estis surscenigita unuafoje en Beijing (Pekino) en la 27-a de junio ĉi-jare kaj varme akceptata de la rigardantoj.

"Sylvia", alinomata "La Nimfo de Diana", estas tipa franca baletto. Ĝi estas adaptaĵo de la epopeo "Aminta" verkita de itala poeto Tasso (1544-1595) laŭ helena mito. Ĝin redaktis Louis Mérante kaj ĝian muzikon verkis fama franca komponisto Léo

Delibes. La baletto rakontas, ke sub la helpo de Amoro kaj Diana, bela nimfo Sylvia kaj paŝtisto Aminta venkis rabiston Orion kaj akiris feliĉan vivon.

Tiu fama baletto estis prezentita de la Centra Baleta Trupo de Ĉinio laŭ la originalo, sub direktado de tri renomaj francaj artistoj alsenditaj de la franca registaro. Estas la unua fojo, ke en la lastaj 30 jaroj majstroj de la Pariza Opera Teatro direktis provludon de tiu baletto ekster sia lando.


EMINENTA DIREKTADO

Reĝisorino Lycette Darsonval estas la ĉefstelulino de la Pariza Opera Teatro. Ŝi ricevis la unuan premion de klasika baletto en internacia baleta konkurso en la komenco de la 30-aj jaroj. Poste ŝi ludis la ĉefrolon en multaj baletoj kaj faris prezentadon en diversaj lokoj de la mondo. Ŝi iam funkciis kiel rektorino de la baleta lernejo de la Pariza Opera Teatro kaj estrino de la Ŝtata Konservatorio de Nico.

Ĉinaj baletistoj tostas al baleta majstro Pascal Vincent je lia naskotago.



Duopa danco en la baletto "Sylvia"



DE LA OPERA N BEIJING

de DU SHA



Baleta majstro Pascal Vincent



Franca artisto Bernard Dayde

Lycette Darsonval bone konas “Sylvia”. Ŝi jam ludis ĝian ĉefrolon preskaŭ centfoje. Kvan-kam 68-jara ŝi estis tre vigla. En ĉinaj vestoj ŝi direktis ĉiutage ĉinajn baletistinojn en provludo, kaj la lastaj modeste lernis de ŝi kaj serioze sin ekzercis. Kiam la baletostenoj, ŝi diris ĝoje: “La apero de ‘Sylvia’ sur la sceno de Beijing estas kristaliĝo de la kultura interfluo inter Francio kaj Ĉinio, kaj mi sentas feliĉon, ke mi kontribuis en tio.”

SENLACA INSTRUADO


Por frue prezenti “Sylvia” al la Beijing-a popolo, baleta majstro Pascal Vincent de la Pariza Opera Teatro venis en la lasta aprilo al la Centra Baleta Trupo de Ĉinio por instruado. Li laboris tre konscie kun penemo, de la 5-a horo matene ĝis post la 5-a horo vespere. Kelkfoje lia vertebrala malsano reaktis lin, tamen li laboris persiste. Konsiderante lian sanon, oni alsendis spertan ĉin-mediciniston por masaĝi lin ĉiutage.

Vincent akcentas efektivan efikon kaj estas lerta en trovo de talentaj novicoj. Preskaŭ ĉiuj protagonistoj, kiujn li elektis por la baletosteno “Sylvia”, estas junaj kaj neniam ludis ĉefrolon. Li elektis la novan kaj junan baletistino Zhang Dandan post mallonga kontakto kun ŝi kaj sin helpis ĉiamaniere.

SINDONEMO

Alia franca artisto Bernard Dayde estas kavaliro de Honora Legio kaj iam servis

Sceno el la baletosteno “Sylvia” prezentata en Beijing



kiel dekoraciisto kaj kostumo-projektisto por ĉ. 300 teatraĵoj de pluraj eŭropaj kaj usonaj teatraĵoj. Ĉifoje, li veturis al Beijing invitite. Post sia descendo de la aviadilo li tuj demandis pri la teatro. Jam en tiu tago li venis al Tianqiao-teatro por mezuri ĝian scenejon. La sekvantan tagon li sin fermis en sia loĝejo. Kaj en la tria tago li jam donis lecionon pri dekoraciado de "Sylvia" al la belartistoj de la Centra Baleta Trupo. Estas mirinde, ke li ne nur klare konis ĉiun detalon de la baletado, sed eĉ prezentis modelojn de la scenoj de la baletado, kiujn li faris en la antaŭa tago.

Daydé laboris diligente. Ĉiutage li devis multe kalkuli kaj mezuri. Krome, li ankaŭ vizitadis la dekoraciajn farejojn por vidi la laboradon kaj doni konsilojn. Li ekdormis ofte je la dua horo nokte, kaj lia sindonemo estis tre kortuŝa.

ESPERO

Krom malmultaj famaj aktoroj kiel Bai Shuxiang, la geaktoroj de la baletado "Sylvia" estis gejunuloj elektitaj de la francaj majstroj, kaj ili neniam partoprenis en prezentado de granda baletado. La baletado sursceniĝis en Beijing nur post pli-ol-unu-monata fervora kaj serioza direktado de francaj artistoj kaj diligenta lernado de la ĉinaj junaj aktoroj. "Miraklo!" ĝoje diris francaj artistoj. Ili aparte admiris Zhang Dandan, unu el la aktorinoj kiuj ludis la rolon de Sylvia. Darsonval diris, ke la 22-jara Zhang havas belegan staturon kaj dancas sufiĉe bone, kompreneble ŝi ankoraŭ devas multe praktiki por fariĝi stelo de la baleta arto.



INAŬGURIĜIS LA TRIA MUZIKA SEMAJNO DE SHENYANG

En la 5-a de aŭgusto inaŭguriĝis la muzika semajno en Shenyang (Senjang), la plej granda urbo en la Nordoriento de Ĉinio.

En la semajno okazis 29 diversspecaj koncertoj kun partopreno de preskaŭ 3,000 profesiaj kaj amatoraj muzikistoj el la tri nordorientaj provincoj Liaoning (Liaŭning), Jilin (Gilin) kaj Heilongjiang (Hejlongjiang) kaj la Gernizona Trupo de Shenyang. La muzikan semajnon ĉeestis laŭinvite ankaŭ famaj kantistoj kiel Zhong Wei, Wei Qixian, Ye Peiyang, Zhu Fengbo, Shi Hong-e, Yu Shuzhen, Guan Mucun el Beijing, Shanghai (Ŝanhajo) kaj Tianjin (Tiangin), kiuj faris turneon en Shenyang.

NACIMALPLIMULTA ARTA FESTIVALO EN GUANGXI

Antaŭ nelonge okazis en Nanning, la ĉefurbo de la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono, la Nacimalplimulta Arta Festivalo plej granda post la liberiĝo de la regiono. En la festivalo partoprenis 14 profesiaj kaj amatoraj trupoj el 12 naciecoj. Ili prezentis 125 programerojn de muziko, danco kaj teatraĵoj. Tiuj programeroj havas fortan vivspiron kaj epokan spiriton.

ĈINAJ SPORTISTOJ GAJNIS 5 ĈAMPIONECOJN

En julio de la kuranta jaro en la internacia atletika konkurso "Libera

Sonorilo" okazinta en la usona urbo Filadelfio kun partopreno de 29 landoj kaj regionoj, la ĉinaj sportistoj gajnis 5 ĉampionecojn, 1 subĉampionecon kaj 4 triajn lokojn.

Laŭ la totala poentaro la ĉina teamo okupis la trian lokon. La 20-jara Zheng Dazhen sukcese transsaltis altecon de 1.92 metroj kaj gajnis la unuan lokon en la virina altosalto. La 23-jara Shen Maomao gajnis la ĉampionecon de la vira lancojeto per 89.14 metroj. Ili ambaŭ rompis la aziajn rekordojn.

Zou Zhenxian gajnis la unuan lokon en la vira trisalto per 16.90 metroj. Shen Lijuan gajnis la unuan lokon de la virina pezglobjeto per 17.09 metroj kaj Xie Jianhua gajnis la unuan lokon de la virina diskojeto per 56.58 metroj.

BALDAŬ ELDONIĜOS "VORTARO PRI NUNTEMPAJ INTERNACIAJ PERSONOJ"

La unua tia vortaro en Ĉinio estas jam finkompilita kaj baldaŭ eldonota de la Shanghai-a Vortara Eldonejo. En ĝi estas prezentitaj pli ol 4,000 mondfamaj personoj en la politikaj, diplomaciaj, militaj, sciencaj kaj kulturaj rondoj, inter kiuj plejparto estas vivantaj personoj, kaj ankaŭ troviĝas forpasintaj eminentuloj antaŭ kaj post la Dua Mondmilito. La tuta vortaro havas 1,500,000 ideografiajn kaj pli ol 200 fotojn.

EKSPOZICIO PRI LA ANTIKVA AGRONOMIO DE ĈINIO OKAZIS EN BEIJING

La ekspozicio malfermiĝis en la komenco de julio. La pli ol 1,000 ekspozitaj objektoj, inkluzive de fotoj, pentraĵoj kaj modeloj, montris atingojn de la laboranta popolo de nia lando en kulturado de grenoj, kotono kaj legomoj, farado de





Papilio-frukta arbo—oledona arboreĝo de montoj

En la Bama-a Jaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio en la nordokcidenta montregiono de Guangxi de Ĉinio sin trovas papilio-frukta arbo el eŭforbiacoj.

Ĝi havas belan formon, verdas dum la tuta jaro kaj floras en printempo, kaj ĝiaj floroj estas hele flavaj. Ĝia fruktokerno havas paron da dikmembranaj kotiledonoj, kiuj tre similas al ripozanta papilio, kaj pro tio ĝi ricevis la nomon. Ĝiaj fruktoj entenas riĉajn amelon kaj grason kaj estas uzeblaj kiel nutraĵo kaj oledona materialo. Eksperimento pruvis, ke cent kilogramoj da ĝiaj sekaj fruktokernoj entenas 32.72 kilogramojn da oleo, tial la lokanoj nomas ĝin oledona arbo-reĝo de montoj. En la produkta taĉmento Jiaxiang troviĝas granda papilio-frukta arbo kun diametro de 1.12 metroj kaj krono de 15 kvadrataj metroj. Iu 90-jara jaŭ-nacieca maljunulo diris, ke ĝi jam aĝas pli ol 100 jarojn kaj ĉiujare donas 500 kilogramojn da fruktoj.

Komence de la sesdekaj jaroj, la gubernio ekprovis kulturi tiajn arbojn kaj multe profitis de tio. En la fino de 1976 la forstuma fako de Guangxi funkciigis kultivejon, kie oni plantis 87 hektarojn da

papilio-fruktaj arbidoj. Nun tiuj arboj bone kreskas.

Papilio-fruktoj povas esti uzataj kiel nutraĵo kaj oledona materialo, dume ĝia brano servas kiel bona manĝaĵo por porkoj kaj ĝiaj ŝeloj kiel materialo por fari tanan ekstrakton. La arba trunko estas bona materialo por konstruado kaj meblofarado kaj ĝiaj folioj furaĝo por bovoj kaj ŝafoj.

PRI KORNOBEKA BIRDO

Kornobeka birdo (*Anthracoceros coronatus albirostris*) estas rara birdo. Ĝi estas kovrata tutkorpe de brile nigraj plumoj, krom helflavaj plumoj sur la kolo kaj blankaj sur la vosto. Ĝi longas de la beko ĝis la vosto ĉ. 0.6 metron kaj la kapo konsistigas kvaronon de la tuta longeco. Ĝiaj brilantaj okuletoj havas tre bonan vidkapablon. Ĝia kaskosimila korneca flava elstaro sur la kapo estas tre okulfrapa. Ĝia malmola flava kaj larĝa beko simila al rinocera korno estas forta armilo por ataki kaj ankaŭ instrumento por trui arbojn kaj konstrui neston kaj por akiri diversajn nutraĵojn. Ĝi manĝas vegetalan tuberon, frukton, ranon, muson, leporeton ktp, kaj ŝatas vivi arope. Antaŭ ekflugo, ĝi ĉiam movadas siajn flugilojn supren kaj malsupren kaj dum antaŭenflugado ĝi forte puŝadas siajn flugilojn malantaŭen kiel remilojn kaj eligas grandan bruon. Ĝia krio tre similas al tiu de azeno.

La nomita birdo demetas siajn ovojn en majo kaj junio ĉiujare.



Post demeto de 3-4 ovoj la birdino ŝtopas deinterne la neston per sia ekskremento kaj glueca substanco sekreciita el la stomako miksitaj kun koto, sekaj herboj kaj fruktoŝeloj. Ĝi konservas malgrandan truon, tra kiu la virbirdo povas ĝin nutri per sia beko. La ŝtopita nesto estas tre efika por preventi surprizatakon kaj ovoŝtelon fare de simio, serpento kaj aliaj animaloj.

Dum la kovado la nutraĵo donita de la virbirdo al la birdino estas envolvita en maldikan membranon defalintan de la stomako de la virbirdo kaj similas al kolbaseto. La virbirdoj klopodas de matene ĝis vespere, iuj eĉ mortis de troa laciĝo.

Kiam birdidoj eloviĝas, la birdino malfermas la neston per sia malmola beko kaj elflugas por serĉi nutraĵon kune kun la virbirdo. Samtempe ĝi fermas denove la neston kaj malfermas ĝin nur kiam la novaj birdidoj plene plumiĝas.

Tia birdo vivas en la densa arbaro de Xishuangbanna de Yunnan-provinco, Ĉinio.

agrikulturiloj, bredado de brutoj kaj silkraŭpoj, kaj ankaŭ en ĝardenistiko.

La ekspozicio montris, ke antaŭ 6,000 jaroj Ĉinio jam kulturis


milion en la baseno de Huangherivero (la Flava Rivero) kaj rizon en la baseno de Changjiang (Jangzi)-rivero, kaj ĝi komencis kulturadon de legomoj kaj bredadon de brutoj

kaj silkraŭpoj pli frue ol aliaj landoj. En la ekspozicio estis montritaj ankaŭ elterigitaj rizo, milio kaj legomaj semoj antaŭ miloj da jaroj.

KARIKATURO

Lakado

Pentrita de JIN CHENG



ĈISOMERE mi vojaĝis al Qufu, Shandong-provinco de la orienta parto de Ĉinio kaj tie vizitis la naskolokon de Konfuceo.

Konfuceo (551-479 a. K.) estis fama pensulo kaj edukisto en la antikva Ĉinio. Lia ideologio havas gravan influon sur la historion kaj socion de Ĉinio kaj eĉ sur iujn aliajn aziajn landojn. Dum pli ol 2,000 jaroj de la feŭda socio en Ĉinio, la regantoj de ĉiuj dinastioj prenis lian ideologion kiel spiritan subtenilon por firmigi sian potencon. En la sekvanta jaro post lia morto (478 a. K.) la Duko Ai de Lu-regno konstruigis la Templon de Konfuceo en Qufu por kulti lin. Dank' al la ripetada riparado kaj plivastigo fare de la sekvantaj dinastioj, tiu templo iom post iom fariĝis ekstreme grandioza antikva konstruaĵaro, kie estas konservataj riĉaj historiaj objektoj kaj arkivoj. Ĝi estas trezorejo de la antikvaj kulturaj objektoj de Ĉinio.

La templo estis loko kie la imperiestroj de ĉiuj dinastioj kultis Konfuceon. Ĉirkaŭata de ruĝaj muroj kun angulaj turoj, ĝi havas sume 466 ĉambrojn. En ĝi troviĝas naŭ kortoj, kiujn interligas la vojoj orienta, okcidenta kaj meza. Ĝi kun areo de 200,000 kvadrataj metroj estas nur iom malpli granda ol la Imperiestra Palaco en Beijing. La sidejo de la templo estis malnova loĝejo de Konfuceo. La loko, kie Konfuceo donis lekciojn, estas Xingtang antaŭ Dacheng-halo. Ĝi estas pavilonforma konstruaĵo. Ĉar tie



estis abrikotujoj antaŭe, oni donis al ĝi la suprediritan nomon (En la ĉina lingvo Xing signifas abrikoton). Dum sia vivo Konfuceo havis 3,000 disĉiplojn, inter kiuj 72 estis plej eminentaj.

Dacheng-halo kun tegmento el glazuritaj tegoloj estas la plej grandioza konstruaĵo en la templo. Ĝi estis finkonstruita en 1500 kaj riparita en 1724. Ĝi je 31 metroj alta, 54 metroj larĝa kaj 34 metroj dika estis la ĉefa loko por kulti Konfuceon. Interne de ĝi pendas giganta portreto de Konfuceo. Antaŭ la portreto staras tablo sur kiu estas metitaj diversaj por-kultaj iloj. La plej allogaj estas la 28 delikate skulptitaj blu-ŝtonaj kolonoj kun ŝtona soklo. Ĉiu kolono estas 5.7

Falsa timigo

Pentrita de GAO FENG



Qufu—Naskoloko

de

Konfuceo

de BAILONG



Turistoj el Xianggang (Hongkong) kaj Aomen riverencas antaŭ la tombo de Konfuceo

metrojn alta kaj havas diametron de 0.8 metro. Sur la 10 kolonoj sub la antaŭa tegmentorando estas gravuritaj po du drakoj ludantaj perlegojn, kaj sur la 18 okedraj ŝtonkolonoj ĉe ambaŭ flankoj kaj sub la malantaŭa tegmentorando — dançantaj drakoj en nuboj. Tiaj kolonoj kun tiel bela kaj vigla plastiko estas nevideblaj eĉ en la Imperiestra Palaco en Beijing.

En Dacheng-halo staras 32 nanmu-lignaj kolonoj, ĉiu kun diametro de 1 metro. Ĝia plafono konsistas el 486 platoj kun ore pentritaj drakoj, impresantaj per beleco kaj majesteco.

En ĝiaj orientaj kaj okcidentaj ĉambroj estas ekspoziciataj centoj da steleoj kaj ŝtonplatoj kun gra-


vuraĵoj de Han-dinastio (206 a. K. — 220 p. K.). Inter ili estas steleo kun surskribo de la regnestro Luxiao en 56 a. K. de Han-dinastio kaj aliaj 16 steleoj kaj ankaŭ multe da ĉizitaj kaligraĵoj de diversaj dinastioj, kiuj estas bonaj materialoj por studi pri la evoluo de la ĉina kaligrafio. La gravuritaj bildoj el strekoj impresantaj per simpleco sur la pli ol 100 ŝtonplatoj vivece spegulas la socian vivon kaj morojn de Ĉinio antaŭ 2,000 jaroj. La ŝtongravuraĵo “Bian Que Kuracas Malsanulojn” prezentas la faman kuraciston Bian Que de Han-dinastio, kiu faras akupunkturon al malsanulo, kaj kvar homojn atendantajn por ricevi lian kuracadon. Tio montris, ke antaŭ 2,000 jaroj la

akupunkturo jam estis vaste uzata en kuracado inter niaj popoloj. La ŝtongravuraĵo “Rigardi Fiŝojn” prezentas, ke gemastroj sidas ŝultron ĉe ŝultro en surakva pavilono kaj apude staras servistoj, ĉe la ŝtuparo sep gastoj fikse rigardas fiŝojn, testudojn kaj pandionojn en la akvo kaj fiŝistojn, kaj ĉe la bordo kvar gardistoj rajdas sur ĉevaloj. La gravuraĵo “Ĉasado” bildigas paron da galopantaj makulaj cervoj, kiujn persekutas tri ĉashundoj, kaj du ĉasistojn arkopafantajn. La artisto vivece prezentis diferencajn mienojn de homoj, hundoj kaj cervoj.

Antaŭen irante, oni povas atingi Shengji-halon, kie estas 120 delikataj ŝtongravuraĵoj pri la tuta vivo de Konfuceo faritaj en 1592

La rezulto kontraŭas al la volo.

Pentrita de GAO FENG





La aleo antaŭ la Konfucea Arbaro

p. K. Tio estas la plej frua bildrakonto sur ŝtonplatoj de Ĉinio kun kompleta enhavo.

En la templo troviĝas konstruaĵo de ligna strukturo Kueiwen-pavilono kun tri tegmentrandoj unu super alia. La domo, konstruita en 1191 kaj riparita en 1499, estas je 27.9 metroj alta, je 35.7 metroj larĝa kaj je 23.5 metroj dika. En ĝi estas konservataj ĉiuj libroj kaj manskriboj donacitaj de la imperiestroj de ĉiuj dinastioj, tial ĝi alinomiĝas "domo por libro-konservado".

Oriente de la templo troviĝas loĝejo de la posteuloj de Konfuceo. Ĝi estis konstruita en 1055, kiam la Imperiestro Renzong de Song-dinastio titolis la posteulon de Konfuceo Yansheng-duko (En la ĉina lingvo Yansheng signifas posteulon de la sanktulo). En la longa feŭda socio la konfucea familio estis protektata de la kortegoj. Ambaŭflanke de la pordo de la loĝejo

staras paro da majestaj ŝtonaj leonoj. La loĝejo okupanta 16 hektarojn da tero havas naŭ kortojn, postdoman ĝardenon kaj 463 ĉambrojn. Ĝi estas la plej granda bieno, kiu travivis la plej longan tempon en la ĉina historio.

En la majesta halo, oni unue vidas seĝon kovritan de tigras felo kaj ruĝe lakitan tablon uzatajn de Yansheng-dukoj. Sur la tablo kuŝas flagetoj, sagoj, ruĝaj kaj verdaj bambuaj slipoj — simboloj de povo, kun kiuj siatempe ili rajtigis aresti kaj bati homojn, kaj tiu, kiu mortbatis homon, ne estis punata. Ili estis senkompare grandaj bienuloj. Laŭ historia noto, ili havis pli ol 60,000 hektarojn da agroj, kiuj dislokiĝas en kvin provincoj kaj unu municipo. Qianlong, la fama imperiestro (1736-1795 p. K.) de Qing-dinastio eĉ edzinigis sian filinon al la pranepo de Konfuceo de la 72-a generacio.

Ĉie en la interna loĝejo de Konfuceo estas luksaj mebloj, jadaj kuriozaĵoj, delikataj kurtenoj kaj diversspecaj silkaĵoj. En iu ĉambro troviĝas 404 arĝentaj manĝiloj. Oni diris, ke 196 pladoj devis esti surtablitaj ĉe ĉiu bankedo donita en la familio de Konfuceo.

En iu notlibro estas skribita ke Kong Lingyi, pranepo de Konfuceo de la 76-a generacio, ŝanĝis 419 diferencajn vestojn kaj ĉapojn en unu jaro.


Proksime de la norda pordego de Qufu-urbeto estas la Konfucea Arbaro, tombejo de Konfuceo kaj liaj posteuloj, al kiu kondukas aleo kun altaj maljunaj cipresoj kaj ŝtonaj homoj, ĉevaloj kaj aliaj bestoj ĉe ambaŭ flankoj. En la arbaro, ĉie staras steleoj starigitaj en diversaj dinastioj kaj kreskas proksimume 22,000 grandaĝaj pinoj kaj cipresoj. Ĝi kun areo de pli ol 200 hektaroj estas la plej granda artefarita ĝardeno de Ĉinio, kie troviĝas ankaŭ multe da kioskoj, haloj kaj domoj konstruitaj en la antikveco por kulti Konfuceon. La tombo de Konfuceo kun alteco de 6.2 metroj kaj perimetro de 88 metroj lokiĝas en la nordokcidenta parto de la arbaro. Antaŭ ĝi staras tombŝtono.

La ruino de la antikva urbo de Lu-regno sin trovas en la nordorienta antaŭurbo de Qufu. De la 11-a jarcento ĝis la 3-a jarcento a. K. ĝi estis la ĉefurbo de Lu-regno. Multe da valoraj historiaj objektoj estis jam elterigitaj en tiu loko. Oni konstatis ke la perimetro de tiu urbeto estis pli ol 11 kilometroj kaj ĝia areo — 17.5 kvadrataj kilometroj. La urbeto estis ĉirkaŭita de fosaĵo kaj havis 11 pordegojn interigitajn per vojoj. Ĉi tie estis elterigita ankaŭ granda nombro da ŝtonaj iloj, argilaĵoj k. a. de la neolitiko, kio montris ke homoj vivis tie almenaŭ antaŭ 5,000 jaroj.

FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

Montaro Pireneaj en Hispanujo

Foto de ELVIRA PUJOL (Hispanujo)




Fotoj de WANG SHOULIANG

Qufu — naskoloko de Konfuceo


Legu la artikolon kun la sama titolo en tiu ĉi numero.

Dacheng-halo — la ĉefa loko por kulti Konfuceon




Gamo-sonorilaro kaj sonora ŝtonplataro en Dacheng-halo

Kesto por teni imperiestrajn ediktojn





La Antaüa Halo — loĝejo de la posteuloj de Konfuceo



Maŭzoleo de Konfuceo

Xingtan, kie Konfuceo siatempe donis lekcionojn



